

Esperanto



Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

103-a jaro • n-ro 1233 (2) • **Februaro 2010**

Festlibro al Humphrey Tonkin



**Eŭropo subtenas
Esperanton**

**Jubileo
en Rusio**

**Instruado en
Indonezio**

**100 jaroj
en Bolonjo**

Esperanto

Oficiala organo de

Universala Esperanto-Asocio

(en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

Fondita en 1905 de Paul Berthelot (1881-1910). Establa kiel organo de UEA en 1908 de Hector Hodler (1887-1920).

Redaktoro: Stano Marček.

Adreso de la redakcio:

Revuo Esperanto
p/a Stano Marček, Zvolenská 15
SK-036 01 Martin, Slovakio
☎ +421 43 4222 788
✉ revuo.esperanto@gmail.com;
redakcio@gmail.com

Aperas:

en ĉiu monato krom aŭgusto.

Redaktofino:

la 10-a de la antaŭa monato.

Legata en 120 landoj.

Voĉlegata por vidhandikapitoj.

Abonprezo: varias laŭlande (EUR 38);
informiĝu ĉe via landa asocio aŭ ĉe la CO.
Unuopa ekzemplero kostas EUR 4,00.

Anonctarifoj (EUR): 1 p. 1000, 1/2 p. 550,
1/4 p. 300, 1/8 p. 165, 1/16 p. 90.
Movada rabato 50%.
Anoncoj sur ekstera kovrilo kostas
duoble. Rabato por tuja ripeto 20%.

Bankokontoj: 378964 ĉe ING-bank,
Postbus 1800, NL-1000 BV Amsterdam
(IBAN: NL72INGB0000378964
BIC: INGB NL2A)
42.60.51.599 ĉe ABN AMRO Bank,
Postbus 949, NL-3000 DD Rotterdam
(IBAN: NL66ABNA0426051599
BIC: ABNA NL2A).

Kreditkartoj:



Adreso de la Centra Oficejo de UEA:
Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ
Rotterdam, Nederlando
☎ +31-10-436-1044,
✉ +31-10-436-1751, ✉ uea@co.uea.org
TTT: www.uea.org

Ĝenerala Direktoro: Osmo Buller.

Enhavo

- 27 ... Malferme: Letero de Humphrey Tonkin
- 28 ... Humphrey Tonkin kaj la Movado (Ulrich Lins)
- 29 ... Tonkin kaj lingvopolitiko (Detlev Blanke)
- 30 ... La 26-a Internacia Festivalo en Nördlingen (Alfred Schubert)
- 31 ... Komune festi la novan jaron (Lu Wunsch-Rolshoven);
"Komuna" en Ĉinio (Chen Ji)
- 32 ... MIREGE: Eŭropo subtenas Esperanton (Guy Martin)
- 33 ... Cent jaroj de la unua rusia kongreso en 1910 (Mikaelo Bronŝtejn)
- 35 ... Zamenhof-Tago: Armenio (Susanna Gevorkjan); Brazilo (Aloísio Sartorato); Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia)
- 36 ... Tajvano (Chuang Yin-hua); Guglo festis Z-tagon.
Simpozio en Novjorko (Scott Page)
- 37 ... Centjarigo en Gliwice (Stanisław Mandrak);
Kotiztabelo de UEA por 2010
- 38 ... Recenzoj: Edmond Brent pri *Fakaj studoj en Esperanto*, *Fake pri Esperanto kaj Esperante pri sciencoj kaj Lingvo kaj Interreto kaj aliaj studoj*
- 40 ... Ziko van Dijk pri *Tuj apude. Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA*; Ionel Oneț pri *Rim-enigmoj*
- 41 ... Laste aperis
- 43 ... Oficiala informilo; Anoncetoj; Kleriga Tago en Havano
- 44 ... Instruado kaj esplorado en Indonezio (Heidi Goes)
- 45 ... 100 jaroj de Esperanto en Bolonjo (Mario Amadei)
- 46 ... Esperanto en plia filmo (AT); Rento je fiksdaj deponoj 2,0%;
95-a UK: Francio unualoke

KOVRILPAĜE: Sabaton, la 9-an de januaro, okazis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo solena aranĝo, dum kiu oni transdonis al Humphrey Tonkin la festlibron *La arto labori kune* (legu pli sur la paĝoj 27-29). Foto: Stano Marček

Estraro de Universala Esperanto-Asocio

Prezidanto (kunordigo, ĝenerala planado): Prof. Probal Dasgupta, LRU,
Indian Statistical Institute, 203 B.T.
Road, IN-700108 Kolkata, Barato;
☎ +91 33 2359 7731;
✉ probal53@yahoo.com.

Vicprezidanto (kulturo, kongresoj, edukado): S-ino Claude Nourmont,
2 Om Kläppchen, LU-5682 Dalheim,
Luksemburgo; ☎ +352 23 66 88 64;
✉ moonmont@pt.lu.

Ĝenerala Sekretario (informado):
S-ino Barbara Pietrzak, Ul. Między-
narodowa 38/40a m 217, PL-03-922
Warszawa, Pollando; ☎ +48 22 252 79
21 [h], ✉ +48 6000 51 425;
✉ bpietrzak@onet.eu.

Financo, administrado, TEJO: S-ino

Loes Demmendaal, Duikerlaan 160,
NL-2903 AC Capelle aan den IJssel,
Nederlando; ☎ +31 10 213 33 20;
✉ l.a.demmendaal@planet.nl.

Landa kaj regiona agado: S-ro Hori
Jasuo, 10-27 Simosinden-mati 10-27,
JP-371-0822 Maebasi-si, Gunma-ken,
Japanio; ☎/✉ +81 27 253 2524;
✉ hori-zonto@water.sannet.ne.jp.

Faka kaj scienca agado: S-ro José
Antonio Vergara, Casilla 508, Puerto
Montt, Ĉilio; ☎ +56 65 256660 [h],
+56 65 344606 [of], ✉ +56 994521017;
✉ joseantonio.vergara@gmail.com.

Observanto de TEJO:

S-ro Gregor Hinker.

Observanto de ILEI:

S-ro Stefan MacGill.

Letero de Humphrey Tonkin

Kara redaktoro, kara Stano,

Vi ĉeestis la ceremonion en Roterdamo, en kiu Probal Dasgupta kaj la estraro de UEA transdonis al mi la festlibron, kiun miaj amikoj Ulrich Lins kaj Detlev Blanke tiel zorgis – kaj sekrete (mi eksciis pri ĝi nur kiam mi legis anoncon en la januara numero de via estimata revuo) – redaktis miahonore. Sekve vi povas raporti al viaj legantoj pri la faktoj de la afero. Vi anticipu petis min respondi al kelkaj viaj demandoj, por transdoni miajn respondojn al la legantoj. En la momentoj post la transdono mi estis tiel emociita, kaj la cirkonstancoj estis tiaj, ke mi nur skize kaj iom nekohera aldonis miajn dankajn rimarkojn. Ĉi tie mi ripetos kelkajn tiujn rimarkojn kaj aldonos unu-du aferojn, kiujn mi devus diri en mia dankesprimado sed stumble ne sukcesis elbuŝigi.

Unue – kaj tion mi emfazis en miaj rimarkoj – se miaj amikoj rajtas fari geston al mi (en tiu ĉi kazo belan kaj certagrade neantaŭviditan geston), mi same plene rajtas fari geston al ili; kaj tio estas, emfazi, ke tiu ĉi honoro estas honoro kolektive meritata, do ke ni ĉiuj laŭ niaj diversaj manieroj kontribuis al la bela momento, kiun ni travivis en Roterdamo – kaj al la koncerna libro. Pli ol cento de miaj geamikoj kontribuis al la volumo mem (mi ne konsciis, ke mi posedas tiom!), kaj mi scias, ke multaj aliaj personoj ankaŭ esprimis siajn bondezirojn; sed mi deziras, ke ni ĉiuj retrorigardu per momento da kontento al la diversaj atingoj, kiujn ni plenumis kune. Nur momento, vi komprenas – ĉar iom da malkontento kaj iu spirito de nekompleteco estas tio, kio spronas nin antaŭen. Kaj ĉiukaze mi neniam pensis pri mi mem kiel aparte modesta, kaj tro da jubileado facile produktas orgojlon...

Mi aparte ĝojis pri la titolo de la verko, *La arto labori kune*. Se ion ajn mi klopodis kaj klopodas praktiki en mia Esperanto-vivo (kaj espereble en la vivo ĝenerale) tio estas trovi la bonon en la homoj kaj eviti la malbonon: trovi la harmoniemon, sur kiu eblas fari kolektivajn laborojn, kaj eviti la kverelemon kiu kondukas malen.

Ankaŭ plaĉis al mi, ke venis por kune festi kun mi homoj, kiujn mi konas tridek, kvardek, eĉ kvindek jarojn – John Wells kaj Victor Sadler, el la 1950-aj jaroj; Eliza Kehlet, Ulrich kaj Detlev, Claude Nourmont, Brian Moon, Otto Prytz, Hans Bakker, Diccon Masterman, Stefan MacGill, kaj pluraj aliaj el la

1960-aj aŭ eĉ pli frue. La Centra Oficejo estis bone reprezentata, el ĉiuj siaj epokoj; la estraro ĉeestis pro morgaŭa estrarkunsido; kelkaj kolegoj el la Akademio ĉeestis; ĉeestis homoj el miaj TEJO-jaroj, el la malfacilaj 1970-aj jaroj, kaj el postaj periodoj.

Mankis tiuj homoj el la fruaj jaroj, kiuj, promesplenaj, tamen pro frua forpaso ne ĝuis la fruktojn de sia laboro. Mi pensas pri homoj kiel Marek Pietrzak, sekretario de TEJO; pri Philippe Bonnard kaj Paul Ciliga, kiuj kunlaboris en STELO; pri Violina Stoičkova kaj Kerrin Masterman, el la jaroj de TEJO. Kaj se la


spiritoj entute animis la ĉambron, mi esperas, ke ĉeestis ankaŭ la spiritoj de Emmanuel Chicot, kiu kunlaboris en Unesko, de Pol Denoël, kiu rolis kiel la granda paciganto de la 1970-aj jaroj en UEA, kaj de Mark Starr kaj Akiko Nagata, kiuj kontribuis al la UN-agado.

Foje oni demandis al James Callaghan, iama ĉefministro de Britio, kiel li sukcesis vivi tiel longe. Lia konsilo: vivu modere, kaj ne surmetu la ŝtrumpojn starante. Estante nur 70-jara, mi apenaŭ povas paroli pri longa vivo: 70 estas la nova 60, eble eĉ la nova 50, kaj mi plene intencas dediĉi min al multaj jaroj de plia laboro por Esperanto kaj por UEA. Sed se vi demandus al mi mian recepton por bona laboro, mi citus tri esencajn

ingredienojn: obstino, klarvido, ĝuo. Nia Esperanto-movado estas dotita per kelkaj homoj de apenaŭ kredeblaj obstino kaj diligento; pensu pri Silfer ĉe *Literatura Foiro*, Maul ĉe *Monato*, Barbara Pietrzak ĉe *Pola Radio*, Korjenkov ĉe *Ondo de Esperanto* (kaj mi certe forgesis multajn) – homoj, kiuj sekvas similan obstinan vojon kiel la antaŭuloj Kalocsay, Régulo, Lapenna, Jung. Sen tiu fundamento de absoluta sindediĉo al iu tasko tra multaj jaroj, ni ne havus la stabilan kaj organizitan movadon, kiun ni havas. Klarvido estas malpli difinebla virto, sed same esenca. Tamen tria ingredienco estas ĝuo: se oni ne ĝuas la laboron por Esperanto, oni ne laboras kune sed laboras pune. Mi laboras por Esperanto pro konvinko, sed ankaŭ ĉar mi ĝuas la partoprenon, ŝatas miajn kunlaborantojn kaj deziras (por tiel diri, kante labori, kaj labore kanti). *Non sine carmine labor*, dirus la antikvaj romianoj – ne sen kanto estu la laboro; sed ankaŭ *Non sine labore carmina* – la kantoj ne venas sen iom da laboro. Eble tiel ni konceptu la ceremonion en Roterdamo.

Nun, ree al la laboro – klarvide kaj kantante!

Humphrey





Humphrey Tonkin kaj la Movado

Kiam Detlev Blanke kaj mi komencis nian taskon, nin turmentis la demando: kia estu la enhavo de *Festlibro Tonkin*? Okaze de datreveno li meritas rekonon al sia tuta personeco.

Ĉar li estas tiel multflanka, ni opiniis, ke ne eblas limigi sin nur al unu flanko. Por plene aprezi lian vivagadon, la *Festlibro* devus enhavi ankaŭ anglalingvajn kontribuojn.

Sed pro praktikaj konsideroj ni decidis aperigi la libron en Esperanto. Ni alskribis homojn, kiuj estas esperantistoj. Ni lasis al ili mem, pri kio verki. Ni ricevis aron da artikoloj, kiuj rilatas al la Esperanto-movado kaj, iom pli ĝenerale, al internacia lingvopolitiko. Tio ne estas miriga. Sed, surprize nur por la nekonantoj, montriĝis, kiom multflanka (r)estas Humphrey Tonkin, eĉ post kiam ni decidis, kiel povus ŝajni, kvazaŭ redukti lin al esperantisteco.

Eble iuj legantoj demandos, kial difinita temo mankas en la libro aŭ kial difinita gravulo ne kontribuis. Mia respondo al tio estas, ke ni tute ne celis kovri ĉiujn aspektojn de la Esperanto-movado aŭ Esperanta lingvopolitiko. Sed verŝajne ni atingis, ke la ĉi-rilataj artikoloj kune donas nekutime vastan superrigardon. Ili pravas, kian potencialon entenas ne nur la movado mem, sed ankaŭ la studoj pri ĝi. Ke estas tiel, impone pravas Humphrey Tonkin, agante por la movado tra kelkaj jardekoj kaj mem verkante resumon de sia engaĝiĝo en la formo de *Lingvo kaj popolo*; al tiu ĉi libro rilatas, cetere ne tute senkritike, unu artikolo (el la plumo de Jorge Camacho). Pluraj kontribuintoj – mi menciui ĉi-loke nur la nomojn Grégoire Maertens kaj Ivo Osibov – traktas periodojn en la historio de TEJO kaj UEA, kiujn Humphrey Tonkin kunformis. Same, aŭtoroj, en kies artikoloj ŝajne mankas rekta rilato al li, sendube kontribuas al la kvalito, kiun ni celis por la volumo. Tio ne plu surprizas ĉe konataj aŭtoroj, sed validas same por aliaj kiel Ken Miner, kiun Tonkin konis en sia junaĝo, kiu poste kvazaŭ kabeis, sed lastatempe reaperis, kaj ankaŭ por homoj ne tre konataj, kiel ekzemple la ĉino Shi Chengtai (kiu rakontas pri la tute mistera korea esperantisto Elpin) kaj la israelano Doron Modan (kies temo estas la kunlaboro de judaj kaj arabaj esperantistoj). La *Festlibro* entenas ankaŭ iom da eseoj esperantologiaj aŭ temantaj pri la Esperanta literaturo. Tiuj, same kiel la artikoloj pri la apliko kaj disvastigo de Esperanto (ekzemple, en Interreto), ĉiuj estas tre proksimaj al la interesiĝo de Humphrey Tonkin.

Kiel supre aludite, ni flankenlasis parton de la multaj aktivadoj de Humphrey Tonkin. Ni ekzemple devis neglekti lian sendube tre fortan sindediĉon kiel universitata prezidanto kaj en la kampo de internacia universitata interŝanĝo. Des pli ni ĝojas, ke Baldur Ragnarsson prezentas lin kiel literatur-

scienciston, pli precize kiel tradukinton de Shakespeare.

Parolante pri la movado: estus neadekvate pleniĝi la *Festlibron* nur per sciencaj studoj. Ĉar Humphrey Tonkin dum sia laboro por la movado vivadis kun kaj inter plej malsamaj homoj, ni eksplicite invitis ankaŭ al la verkado de mallongaj eseoj kun personaj memoroj. Certe, multaj pliaj personoj ol tiuj, kiuj liveris ion el sia memoro, povus kontribui, sed ni hezitis peti al ekzemple Victor Sadler kaj John Wells, ke krom verki sciencan eseon ili, la kembriĝaj studkamaradoj, ankaŭ skribu anekdoton. Same, mi mem tiurilate detenis min, kvankam mi bone memoras la komencon de miaj rilatoj al Humphrey antaŭ precize kvindek jaroj. (Dum la 3-a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo en Limburg en la jarŝanĝaj tagoj de 1959/60 mi, kiel ankaŭ Eliza Kehlet, konatiĝis kun li.) Estis Humphrey, kiu enkondukis min en la internacian movadon. En 1964 mi eniris la estraron de TEJO kiel kasisto – fakte, kiel lia posteulo. Li mem tiam avancis al la posteno de vicprezidanto. Nelonge post la elekto mi hazarde, nevole, kaŝaŭskultis, kiam li diris al aliaj: "Ha, kiel mi ĝojas, ke mi liberiĝis de tiu diabla kaso." Mi neniam parolis kun li pri tiu konfeso; maltrankviliĝon mi subpremis. Superregis la sento, ke la funkcio de kasisto de TEJO estas grava tasko kaj ke Humphrey eble ne senkiale instigis min transpreni ĝin. Mi do frutempe spertis tion, kio esprimiĝas en la titolo de nia festlibro: *La arto labori kune*.

En la enkonduko ni iom prezentas lin. Ankaŭ la anekdot-similaj kontribuoj, parte amuzaj, kiuj troviĝas en la libro, helpas proksimigi la personon. Sed respondojn al la demando, kiu kaj kia li estas, unuavice donas la teksto de longa interparolo, kiun Mark Fettes havis kun Humphrey Tonkin. Tiu intervjuo eble pleje proksimas al evidentigo de la multflankeco, laborenergio kaj ankaŭ humuro, kiuj karakterizas la jubileulon. Ĝi malkaŝas multon el la persona historio de Humphrey Tonkin, kio ĝis nun ne estis publikigita. Nur tie, cetere, ni ekscias iom pli pri liaj rilatoj kun Ivo Lapenna. Tio estas ĉapitro en la historio de UEA, kiu estas nesufiĉe konata, sed tre signifa, ĉar la unua prezidanteco de Humphrey Tonkin (ekde 1974) sendube estis la plej granda defio en lia movada kariero. Kun admirinda trankvilo li gvidis la asocion en tiuj malfacilaj jaroj. Li kreis la fundamenton de UEA en la epoko post Lapenna – merito, pro kiu li eble ankoraŭ ne estis adekvate dankata.

Tiu ĉi *Festlibro* dokumentu nian dankemon al Humphrey Tonkin. Ni gratulas lin, kaj samtempe ni ankaŭ dankas lin pro tio, ke li (kiel dirus Ludovikito) bonvolis atingi la respektindan aĝon de 70 jaroj, tiel donante al ni la okazon prepari volumon, kies kontribuoj klopodas respeguli kaj sekvi lian modelon de serioza, antaŭenpuŝa movad-agado.

Ulrich Lins

Tonkin kaj lingvopolitiko

***La arto labori kune*, tio vere estas unika festlibro por la prezidinto de UEA. Ĝi entenas 110 tekstojn de 106 aŭtoroj, krom tio aron da fotoj. Kun siaj 901 paĝoj ĝi estas la plej ampleksa libro, iam ajn eldonita de UEA. Kaj en la serio de Esperantaj festlibroj (se ni ignoras la 4-voluman festlibraron por Juan Régulo Perez 1985-1990, de kiuj la volumo II estas aparte esperantlingva) ĝi estas la ĝis nun plej ampleksa kaj enhave plej riĉa.**

En aparta "enkonduko" (p. 14-19) ni redaktoroj klopodis aprezi la multflankan agadon de la jubileulo, tamen konsciaj, ke tio sukcesis nur nesufiĉe. Pro tio la solena aranĝo en la Centra Oficejo de UEA (9.1.2010) por la transdono de la verkego – ĉu Ludovikito eĉ ĉi-kaze parolus pri "kajero"? – estis bonvena okazo prilumi iom pli detale kelkajn gravajn aspektojn en la agado de prof. d-ro Humphrey Tonkin. Li ja ne nur estas esploristo, universitata instruisto kaj rektoro, ne nur verkisto, tradukisto, redaktoro..., sed ankaŭ – kaj tio al mi ŝajnas aparte grava – populariganto de scioj (ne laste kiel brila oratoro) kaj organizanto, kiu kapablas kunlabori kaj kunlaborigi.

Oni ofte forgesas, ke la plej brilaj ideoj ne multe utilas, se oni ne donas organizan bazon al ilia realigo, disvastigo kaj efikado. Ĉi-rilate al mi ŝajnas aparte gravaj la aktivadoj kaj impulsoj de la honorito por enkadrigi Esperanton kaj la esperantistan agadon en modernan internacian lingvopolitikan kadron. Tion li kompreneble ne faris sola, sed li tion faris aparte sukcese kaj ofte en gvidaj pozicioj.

Ne eblas ĉi tie kontentige difini, kio estas "lingvo-politiko". Por nia kompreno ni diru, ke lingvopolitiko koncernas la konscian influon de homoj, homgrupoj, organizaĵoj, ŝtatoj kaj de aliaj influhavaj instancoj sur lingvoj, sur iliaj sociaj pozicioj, evoluoj, funkcioj kaj aplikoj.

En multaj artikoloj, monografioj kaj redaktitaj verkoj (vidu la ampleksan bibliografion sur p. 878-901 de la festlibro), sed ankaŭ en paroladoj, dumkongresaj diskutgrupoj kaj ĉe aliaj okazoj Tonkin tuŝis diversajn aspektojn de lingvopolitiko, inter



Fotoj: Ziko van Dijk

ili la rilatojn inter lingvo kaj homa/etna identeco, lingvaj rajtoj, hegemoniaj kaj subpremataj lingvoj, lingvo kaj politiko, lingvo kaj ekonomio, lingva diskriminacio, multlingvismo, la rolo de interlingvoj, faktoroj influantaj lingvo-elekton, lingvo-protekto aŭ lingvo-morto, lingvo-planado ktp. Pro tio ne estas mirige, ke la sekcio II de la festlibro "Lingvopolitiko kaj lingvoplanado" (p. 47-183) kun 16 kontribuoj estas aparte abunda, sed lingvopolitikajn aspektojn ni ankaŭ trovas en kontribuoj de aliaj sekcioj.

Sub lia influo diversaj lingvopolitikaj agadoj kunkreskis al certa reto, certasence al iu kohera tuto. Jen kelkaj elementoj:

(1) Jam en 1969 Tonkin partoprenis la naskigon de la lingvopolitika revuo *La Monda Lingvo-Problemo* (LMLP). Ekde 1977 ĝi nomiĝas *Language Problems & Language Planning* (LPLP), kiun li en diversaj pozicioj (kun)redaktis, resp. redaktadas. La ŝanĝo de la titolo de la revuo estas programo. Venkis la ekkono, ke ne ekzistas nur unu (la) monda lingvo-problemo, sed tuta aro da diversspecaj mondaj lingvaj problemoj, kiuj havas, resp. povas havi influon al strategio kaj taktiko de la Esperanto-movado. Temas pri lingvaj problemoj, al kiuj Esperanto povas havi certajn problemsolvajn resp. problemredukatajn respondojn, ĉu jam nuntempe, ĉu potencie en la estonteco.

(2) Ankaŭ en 1969, sub la ĉefa redakto de la tiam nove elektita prezidanto de TEJO, aperis la fama Deklaracio de Tyresö, kiu i.a. alvokis forlasi certajn bremsajn difinojn de neŭtraleco kaj malfermis la komprenon al politikaj kaj aliaj aspektoj de la lingvaj problemoj. Ja memevidenta ŝajnas la deklaracia konstato "La lingvo estas realaĵo intime ligita al sociaj kaj politikaj fenomenoj"...

(3) Plian ŝtupon en la lingvopolitika engaĝiĝo de prof. Tonkin markas lia direktoriĝo de CED, kiu poste ŝanĝiĝis de "Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo" al "...Mondaj Lingvaj Problemoj". CED fariĝis institucio por diversaj lingvopolitikaj iniciatoj, kiujn li impulsadas. Ekzemple:

(4) Kun diversaj neesperantistaj partneroj okazis, resp. de tempo al tempo okazas, konferencoj pri lingvopolitikaj temoj, kie Esperanto estas lerte enplektita. Sole de



Emociplena transdono de la festlibro al Humphrey Tonkin en la CO de UEA.

La 26-a Internacia Festivalo en Nördlingen



137 gastoj el 21 landoj kaj tri kontinentoj de la "26-a Internacia Festivalo" (IF) ĝuis la amikan etoson de la tradicia renkontiĝo en la bavara urbo Nördlingen de la 27-a de decembro ĝis la 4-a de januaro. Kulmino de la aranĝo estis la silvestra festo kun tosto al la novjaro en la landoj de la partoprenantoj. Kvarfoje oni tostis al la nova jaro – de la gastoj el Rusio, orienta Eŭropo, meza Eŭropo kaj Britio – de la 10-a vespere de la silvestra tago ĝis la 1-a matene de la "novjara tago" en Germanio.

Por la 26-a IF la organizanto Hans-Dieter Platz, pli bone konata en Esperantio sub la mallongigo HDP, denove preparis vere internacian programon. Sub la kadra temo "Fabeloj, fabloj kaj legendoj" li prezentis vere internacian programon, kiu ampleksis pli ol 60 erojn. Ekster tiu kadro estis prelegoj de la "3-a Internacia Vintra Universitato" agnoskitaj kiel AIS-sesio. Parolis i.a. profesoro Amri Wandel pri "Fabeloj de sezonoj kaj astroj", d-ro Eugen Macko pri "Ekologio de kulturoj kaj la hipernacia lingvo" kaj Hannes Larsson pri "Distraj matematikoj". De Yashovardhan Singh la gastoj povis ekscii pri "La historio de la nulo".

La tuttaga ekskurso gvidis la IF-anojn al la proksima urbo Nurenbergo (germane: Nürnberg), la lulilo de la Esperanto-movado en Germanio. Tie vivis fine de la 19-a jarcento Leopold

Einstein, famkonata pioniro de Esperanto. Li fondis la unuan Esperanto-asocion kaj eldonis la unuan Esperanto-gazeton. La urbogvidadon preparis membroj de la nurenberga grupo, kiu ankoraŭ hodiaŭ estas unu el la plej aktivaj en Germanio.

Plej allogaj estis la kulturaj aranĝoj vespere – dagestana, rusa, kaj israela vesperoj – kaj la "knaĵpo", la intertempe internacie konata babilejo de IF, kiu funkcias dum la programpaŭzoj kaj vespere ĝis longe post noktomezo.

La 26-a IF ne nur profitis de la bona laboro de la organizanto kaj de la multaj helpantoj, sed ankaŭ de la bona loko. La "Jugend- & Familiengästehaus" en Nördlingen laŭ kvalito troviĝas ie inter bona junlargastejo kaj hotelo. Pro ĝia taŭgeco HDP jam elektis ĝin por la venonta IF. La ekskurso gvidos la gastojn al la bavara ĉefurbo Munkeno.

Alfred Schubert

▶ 1983 ĝis 1996 okazis 8 konferencoj, kiujn Humphrey Tonkin grave influis aŭ/kaj (kun)organizis kaj kies aktojn li ĉefredaktis (kun i.a. jenaj temoj: la monda komunika jaro 1983, lingvaj kondutoj en internaciaj organizaĵoj, lingva planado sur internacia nivelo, la ideo pri universala lingvo, superi lingvajn barilojn, la ekonomio de lingva uzo, lingvo kaj kulturo en internaciaj organizaĵoj).

(5) Por teni la rilatojn de UEA al Unuiĝintaj Nacioj dum certa tempo li prizorgis oficejon en Novjorko, pliintensigis la rilatojn kun Unesko (ne laste lige kun la preparoj de la Internacia Komunika Jaro), nodis kontaktojn al diversaj fakaj organizaĵoj el la reto de UN kaj al neregistaraj organizaĵoj.

(6) Kvazaŭ daŭrigo de la lingvopolitikaj konferencoj de Novjorko, sed pli forte ligitaj al Universalaj Kongresoj, estas la t.n. Nitobe-simpozioj, tiuj kelklingvaj lingvopolitikaj aranĝoj (1996 Praha, 1999 Berlin, 2004 Beijing, 2005 Vilnius, 2007 Jokohama), kiuj estus nepenseblaj sen la intelekta kaj organiza kontribuoj de la jubileulo. La antaŭ nelonge okazinta simpozio pri Zamenhof (15-a decembro 2009) estis kvazaŭa revivigo de la novjorkaj konferencoj. Ĝia ĉefa motoro estis Humphrey Tonkin.

(7) Kiom valoras esploroj kaj studoj pri lingvopolitikaj temoj lige kun Esperanto, se oni ne konas ilin? Por informigemaj sciencistoj necesas fiksi tion, kio jam estas esplorita, pensita, farita, sur kio povus plukonstrui aliaj, sen reinventi la radon. Ja temas pri lingvopolitike gravega laboro: la bibliografiado por la sekcioj "Auxiliary languages. International languages" de la usona International Bibliography of Books and Articles on the

Modern Languages and Literatures" (ĉiujare publikigata de The Modern Languages Association of America, New York, MLA). Humphrey Tonkin estas dum jardekoj por MLA la ĉefa bibliografo por interlingvistikaj materialoj.

(8) Ne laste por sukcesigi esplorojn kaj lingvopolitikajn aktivajn necesas financa bazo. Ankaŭ ĝin kunkonstruis nia jubileulo sub la nomo "Esperantic Studies Foundation", jam en la jaro 1968, kaj gvidas ĝin ekde la komenco (vidu www.esperantic.org).

(9) Kvankam ĉio ĉi menciita aparte efikas eksteren, ĝi tamen ankaŭ havas klerigajn kaj edukajn efikojn internen. Pri tio i.a. atestas la rolo de Humphrey Tonkin kadre de la lingvo-komunumo mem, aparte dum la Universalaj Kongresoj. Multaj el la kongrestemoj, kiujn li ne malofte enkondukis, gvidis kaj/aŭ diskutigis, estas nete lingvopolitikaj. Ankaŭ lia daŭra engaĝiĝo por la esperantologiaj konferencoj kaj aliaj fakaj iniciatoj estas konsiderinda.

Oni povus daŭrigi la liston. Apenaŭ eblas imagi, ke ĉie la jubileulo grave rolas, kunrolas aŭ ĉefrolas. Li liveras al ni argumentojn. (Kiam li "liveros" al ni volumon kun siaj elektitaj prelegoj kaj eseoj?) Li plifortigas niajn konvinkojn kaj kuraĝigas, sed ankaŭ kapablas kritiki kaj milde ironii pri niaj eraroj, tamen, se necese, ĉiam helpante. Ja tio estas lia arto labori kune. Oni daŭre ĉerpu inspirojn kaj instigojn el la agado de Humphrey Tonkin kaj el la festlibro, dediĉita al li.

Detlev Blanke

Komune festi la novan jaron

Entute 194 homoj partoprenis en la 8-a Novjara Renkontiĝo (NR) kaj la 1-a Novjara Internacia Semajno (NIS) de EsperantoLand en Saarbrücken. Ili venis el 14 landoj, interalie el Kanado, Aŭstralio kaj la siberia Rusio, sed plejparte el la pli proksimaj Belgio, Francio, Svislando kaj Germanio. Tri kvaronoj venis el eksterlando, pro kio regis bele internacia etoso.



5 6 infanoj kaj junuloj ĝis-14-jaraj multe ĝuis la kunestadon kaj la programon kun manlaboro, ludoj, prezentado kaj lernado de pupteatro – ĉio sub la lerta gvido de Christoph Frank kaj subtenata de Betti Maul-Propadoviĉ kaj Nicky Janssen.

Almenaŭ tridek infanoj lernas Esperanton denaske kaj jen dum NR havas belan eblon interkonatiĝi kaj amikiĝi kun samaĝuloj el aliaj landoj.

Prezentiĝis koncerto de Martin Wiese kun malnovaj kaj novaj kantoj ĉefe rokstilaj, bela koncerto de Lena kun Ŝenja, Gretel kaj Jorinde (lastatempe formiĝinta grupo) kaj aŭdeblis imponaj operaj kantoj de Vladimir Merkulov en Esperanto (akompanata de Lena Wilke). Krome vespere oni spektis teatraĵon, ludis – kaj kompreneble festis la novan jaron, dancante ĝis la frua mateno. Okazis diversaj prelegoj kaj

kursoj traktantaj ekzemple la ĉinan historion, budaisman meditado, la ŝanĝojn post 1989, la planedan sistemon, ludan pedagogion kaj ankaŭ venkon (aŭ malvenkon) kaj strategion por Esperanto. Junuloj kaj junaj plenkreskuloj povis ĝui ekzemple la diskotekon, du enketludojn, ekskurson al Strasburgo aŭ prezenton de filmoj de Mr. Bean. Kaj kompreneble ili amuziĝis ankaŭ laŭ propra programo.

Aparte afable raportis la gazetaro pri nia internacia kunveno. Germana novajagentejo komencis per regione sendata raporto, sekvis pluraj represo, granda artikolo en la sarlanda *Saarbrücker Zeitung*, tri minutoj en la novaĵoj de la regiona televido (programero ripetita en tutsemajna novajelsendo) kaj kontribuoj en tri radioprogramoj, el kiuj unu dediĉis plenan horon kun tri Esperanto-muzikpecoj al nia lingvo.

Lu Wunsch-Rolshoven, EsperantoLand



Ĉina Junulara Esperanto-Asocio (ĈJEA) gastigis la lastan KS-on kun la temo "Okupiĝo de junuloj en financa krizo". Jiang Limin, la prezidanto de ĈJEA, prezidis la malferman ceremonion, en kiu delegitoj el la kvar landoj bondeziris kaj salutis la partoprenantojn, kaj donis informojn pri la E-movadoj de siaj landoj.

En diskuto oni konstatis, ke la kvar landoj renkontas la saman problemon, nome ke mankas junuloj kiuj flue parolas la lingvon, kaj ke la E-aktivado malofte okazas pro monmanko aŭ tempomanko de junuloj. Kun la disvolviĝo de interreto eble la problemo estos solvebla. Jung Eun Kyung el Koreio diris, ke antaŭ du jaroj ŝi eklernis la lingvon, kaj hodiaŭ jam povas sufiĉe bone paroli ĝin, danke al Skajpo, per kiu ŝi ĉiutage babilas.

"Komuna" en Ĉinio

La 28-a Komuna Seminario inter ĉinaj, japanaj kaj koreaj junuloj (KS) solene malfermiĝis la 27-an de decembro en Nankino, la ĉefurbo de la Jiangsu-provinco, sudorienta Ĉinio. Partoprenis pli ol 40 junaj esperantistoj el Ĉinio, Japanio kaj Koreio, kaj notinde du el Vjetnamio.

La ĉeestantoj interesiĝis pri la aktivado de la vjetnama junularo. Nguyen Hoangyen, la 17-jara VJEO-prezidantino, konigis la ĉeestantojn kun la historio de la organizaĵo, kiu fondiĝis en 2008 kaj nuntempe havas pli ol 70 junajn membrojn.

KS komenciĝis en la jaro 1982, kiam junaj japanaj kaj koreaj esperantistoj okazigis komunan kunvenon por pridiskuti la E-movadon de la du landoj. En la jaro 1995 ankaŭ Ĉinio partoprenis en la renkontiĝo. De tiam la tri landoj alterne ĉiujare organizas la seminarion, ĝenerale kun temoj pri kulturo kaj Esperanto.

Post sia 28-jara vivo KS jam fariĝas efika renkontiĝo de junaj aziaj esperantistoj.

Chen Ji



MIREGE: Eŭropo subtenas Esperanton

En Francio oni kutime diras: "Se vi ne volas ricevi subtenon, plej efike estas ne peti ĝin". Tro ofte oni opinias ke publikaj instancoj ne ŝatas Esperanton kaj nepre rifuzos monhelpon al niaj agadoj.

Ni spertis la malon. En februaro 2009 Franjo Levêque prezentis al Esperanto-France sian projekton MIREGE (Muzika Internacia Renkontiĝo Eŭropa por Gejunuloj Esperantistaj). Temis pri semajna renkontiĝo de gejunuloj, kiuj uzas Esperanton por konstrui eŭropan identecon, preparante artan spektaklon, prezentotan antaŭ publiko. En Esperanta medio oni ja kutimas organizi tiajn renkontiĝojn. Sed Franjo celis venigi al la renkontiĝo junulojn el sep malsamaj landoj de Eŭropo.

Al grupoj el orient-eŭropaj landoj la kostoj de la vojaĝo kaj restado malebligis partopreni. Por eviti tiun obstaklon Franjo proponis peti subvenciojn de Eŭropa komisiono kaj franca regiona konsilio. Esperanto-France atente ekzamenis tiun projekton kaj konsentis veti je ĝia sukceso. Claude Nourmont kaj Aleks Kadar helpis Franjon atingi la celon.

Redakti eŭropan subvenciosieron postulis multe da laboro. Dekojn da dokumentoj ŝi devis legi por kompreni la ĉefajn dezirojn de Eŭropa Komisiono kaj tiudirekte adapti MIREGE: ne nur renkontigi junulojn el eŭropaj landoj, sed ankaŭ helpi ilin konstrui eŭropan identecon.

Al la internacia arta esperantista renkontiĝo por gejunuloj en Muzikan centron en Baugé venis grupoj el Bulgario, Ĉeĥio, Francio, Rumanio kaj Ukrainio, kun la gvidantoj 34 personoj. Ne venis grupoj el Slovenio (pro malsano) kaj el Italio (la gejunuloj ne povis forlasi la lernejon). Samtempe al la centro venis 64 junaj francaj muzikistoj en la aĝo de 4 ĝis 16 jaroj.

Ĉiumatene André Demarque el Bruselo malkovrigis al la «Mirantoj» la vivon de Vincent Van Gogh, pere de ludoj, puzloj, anekdotoj, teatraĵoj. Karbonkrajonojn ili uzis sub la konsiloj de André por kopii pentraĵojn de Van Gogh, kaj ekspoziciis ilin por la loĝantaro de Baugé. De la 11-a horo ĝis tagmezo Franjo kun ĉiuj ekzercis kantadon de naciaj kantoj el la landoj, el kiuj la gejunuloj alveturis.

Pluraj grupoj kunportis tekstojn de popolaj kantoj por prepari internacian kantprogramon, la 30-an de oktobro en la festa salono de Baugé. Ankaŭ la junaj muzikaj staĝanoj partoprenis tiun koncerton, ĉu por Esperante kanti, ĉu por muzikinstrumente akompani la koruseton.

Posttagmeze la gejunuloj povis pentri, teatrumi, kanti, danci, sporti, ludi. La suna vetero allogis ilin al ludoj ekstere. Ĉiuj rendevuis fine de la posttagmezo por malkovri unu el la landoj: tradiciojn, kuirreceptojn, iom pri la historio de la lando kaj fine la kantojn kaj dancojn. Dimanĉe prezentis sin Rumanio, lunde Bulgario, marde Ĉeĥio, merkrede Francio kaj jaŭde Ukrainio. Vendrede en la festa salono de Baugé okazis solena vespera programo kun

kantoj kaj dancoj, komune kun la junaj francaj muzikistoj.

Laŭ la bilanco farita de la gejunuloj de MIREGE sabaton la 31-an de oktobro 2009, MIREGE 2009 estis granda sukceso. Pri la renkontiĝo ili longtempe memoros. Mariana Evlogieva el Bulgario pretas organizi la venontan MIREGE 2010 per la sama eŭropa subvencio.

Guy Martin

**Ĉarmaj kaj graciaj
junulinoj, folklore
vestitaj, kiuj dancas kaj
kiuj ridetante prenas vin
per la mano por inviti vin
danci kun ili. Tio estas
la ĉefa memoraĵo de la
mirinda semajno, kiun mi
pasigis en Bretonio fine
de oktobro.**

André Demarque, Belgio

Cent jaroj de la unua rusia kongreso en 1910



1-a Ruslanda esperantista Kongreso 1910 en Peterburgo. 1) D-ro L.L. Zamenhof. 2) A.A. Postnikov (Prezidanto de la kongreso). 3) N.V. Korzinskij. 4) P.E. Vasilkovskij. 5) A.A. Ivanickij. 6) V.F. Barabanova. 7) D.D. Valkov (+). 8) V.N. Devjatnin. 9) E.N. Nozikova. 10) M.S. Valentinov. 12) N.P. Evstifeeff. 26) V.I. Lojko. 49) A.A. Saĥarov.

Dum jardekoj kolektante ĉion presitan en la pasinta kaj antaŭpasinta jarcentoj, lige kun la lingvo kaj la movado, mi ŝatas re- kaj re-foliumi tiujn flaviĝintajn paĝojn. Gustumi la antaŭjarcentan lingvaĵon. Pristudi vizaĝojn de tiamaj balenoj de la movado en malnovaj fotoj. Kompari tiamajn eventojn kun la nunaj, elserĉante similaĵojn kaj diferencojn. Malavare la epoko iama prezentas al mi netrotakseblajn lecionojn por pli lertaj agoj en la epoko nuna. Do min rodas la tento konstrui la ĉi-suban rakonton el historiaj brikoj, metante inter ilin morteron de la nuna tempo.

Iam en 1907 en Esperanto-movado de Sankt-Peterburgo, la tiam ĉefurbo de Rusia Imperio, reaperas juna (nur dudek-sep-, do TEJO-aĝa), bone edukita, ambicia persono – kapitano de la cara armeo Aleksandr Postnikov. Posedante krom la ecoj menciitaj ankaŭ nobelan devenon kaj grapolon da ordenoj kaj medaloj ricevitaj pro heroa partopreno en du militoj, li havas alireblon al la plej altrangaj oficistoj kaj enireblon en la plej altajn mondumajn rondojn. Nature liaj kontaktoj kaj ligoj estas utilaj por la movado en kiun li revenis kun la kapo plena de originalaj ideoj pri antaŭenmovo de la internacia lingvo en Ruslando.

Mi diras "reaperis, revenis", ĉar mi rajtas supozi ke eĉ antaŭ sia heroa militado Aleksandr Postnikov estis esperantisto. Plej verŝajne li estis lerninta la lingvon kune kun la frato Fjodor Postnikov, kiu jam en 1906 estis renoma esperantisto en la Fora Oriento, kaj famiĝis iom poste en la esperantistaj medioj de Japanio kaj Usono kiel "kapitano Post". Mi supozu ke Aleksandr Postnikov, posedante la lingvon, antaŭe ne aktivis en la movado nur pro sindono al la alia okupo – la heroa militservado. Do mi iom precizigu ke nun, vundite, kuracite

kaj ricevinte ne tro temporvan postenon de oficiro respondeca pri edukado ĉe Milit-Medicina Akademio, li revenas al Esperanto kaj mergiĝas en la movadon.

La ĝenerala filistra konvinko pri malseriozezo de nia movado estis forta tiam kaj plu restas nun. Sed se ni esploru la vicajn de la movadanoj tiamaj, ni trovos inter ili aron da personoj altestimataj kaj aŭtoritataj ankaŭ en la vivo de la ĉefurbo. Altrangaj militistoj, universitataj profesoroj, respondecaj oficistoj de ŝtataj ministerioj aktivis ankaŭ por Esperanto. Ho ve, serĉante tiajn hodiaŭ en la rusia movado, la esploranto sentos fortan disreviĝon. Eĉ en la sovetia tempo inter la samideanaro troveblis multaj aŭtoritataj personoj, sed nun... Eble ni devus pli inventeme kaj pli dece agiti en la koncernaj rondoj.

Efektive la movadaj aktivizaĵoj de Postnikov estas multnombraj, originalaj kaj fulme sinsekvaj, senpaŭzaj. Jen li kun la renoma ĵurnalistoj Petro Vasilkovskij faras prelegvojaĝon en la Volgia kaj Kaŭkaza regionoj de la lando, agitante por Esperanto kaj lasante post si novfonditajn kursojn kaj societojn. Jen li sendas lernolibrojn kaj vortarojn donace al la Imperiestra familio, kaj ricevas skriban dankon mem de la carino Aleksandra Fjodorovna. Jen li vizitas Jasnaja Poljana, la bienon de grafo Tolstoj, kaj parolas kun la mondfama verkisto pri Esperanto. Jen li pacigas du disputantajn societojn en la ĉefurbo kaj surbaze de la unuiginta societo fondas oficiale registritan "Ruslandan Esperantistan Ligon" (R.E.L.), al kiu iom post iom aliĝas aliurbaj grupoj kaj societoj. Postnikov prelegas, eldonas revuon, disdonas informilojn kaj lernilojn, organizas propagandajn koncertojn kaj balojn. La Esperanto-vivo en la ĉefurbo bolas, ĝi estas imitinda kaj kuraĝiga ekzemplo por la tuta lando, sed ne por ĉiuj samideanoj. El la "unuatona" ĉefurbo Moskvo la sukcesojn de la "parvenuo" ĵaluze gvatas Moskva Esperantista Societo (M.E.S.) ĉe antaŭnelonge aperinta librejo "Esperanto", gvidata de Aleksandr Saĥarov. Kiel persono prudenta kaj kiel fervora esperantisto Saĥarov agnoskas la utilecon de la agoj, kiujn entreprenas la brava kapitano, sed samtempe li vidas antaŭ si seriozan rivalon, minacantan la prosperon de lia entrepreno.

Diversaj homoj – diversaj opinioj. Foje okazas pro tio nepacigeblaj disputadoj en sociaj movadoj, havantaj eĉ la plej noblajn celojn. Ankaŭ nia verda popolo ekde sia apero kaj ĝis la nuna tempo estas ŝirata en pecojn per aro da internaj skandalaj kaj reciproka malestimo, kiuj apenaŭ helpas nian antaŭeniron. Ŝajnas al mi eĉ ke la plej gravan progreson dum la pasinta jarcento ni atingis ĝuste pri la kvanto de lokaj, landaj kaj internaciaj disputoj de esperantistoj. Kion ni dividas, trenante nian ĉaron diversflanken? Pli-malpli serioza materia posedaĵo mankas. La interna ideo ne estas dividebla. La aŭtoritato, hm, ĝi estus multe pli forta, se ni havus iom pli da unanimeseco.

En majo 1909 Postnikov komencas efektiviĝi sian vican ideon pri organizo de la unua landa esperantista kongreso. Lia alvoko trovas subtenon de ĉiuj filioj de R.E.L. La kongreso estas planita por decembro 1909, sed pro teknikaj kaŭzoj (provizora manko de kelkaj oficialaj konsent-subskriboj) permeso de la rusia registaro estas donita nur por la paska semajno 1910 (21-27 de aprilo laŭ la malnova kalendaro). Estas amuze, ke la 16-an de februaro 1909 M.E.S. decidis: "... konsideri la projektatan kongreson nur kiel konferencon, celantan ellabori kaj starigi definitivajn decidojn pri la unua kaj sekvontaj oficialaj kongresoj de ruslandaj esperantistoj kaj partopreni en ĝi nur kun la supre dirita kondiĉo".¹ La kapitano, ĉeestanta la kunvenon en Moskvo, konsentas kun la starigita kondiĉo, sed, pro maleblo reformuli la oficialajn, jam pretajn permesdokumentojn, anoncas tamen la aranĝon kiel Kongreson. Saĥarov, kies publikigitaj rememoroj enhavas multajn arbitrajn asertojn kaj faktajn malveraĵojn rilate al Postnikov, informas ke, malgraŭ alvokoj bojkoti la Kongreson, en Peterburgon decidis iri sep reprezentantoj de M.E.S. Al la kongreso aliĝas pli ol tridek peterburgaj esperantistoj kaj du dekoj da aliurbaj reprezentantoj. Jen estas provizora demandaro, publikigita en *Ruslanda Esperantisto* por la kongresa programo: "I-a Ruslanda Esperantista Kongreso – Projektitaj demandoj: 1. Propagando de la lingvo Esperanto. 2. Unuigo de la agado de ĉiuj esperantistoj en Ruslando. 3. Organizado de ruslandaj esperantistaj kongresoj. 4. Internacia esperantista kongreso en Ruslando. 5. Reprezentado de ruslandaj esperantistoj en eksterlando. 6. Instruado de la lingvo Esperanto. 7. Esperantaj libredonado kaj komerco. 8. Klopodoj pri la akcepto de la lingvo Esperanto per la manieroj leĝdona kaj administra."²

Aleksandr Saĥarov diras en siaj rememoroj: "Partopreno en ĉi tiu kongreso prezentas la plej malagrablajn momentojn de mia laboro sur Esperanta kampo"³, sed mi opinias ke tiu ĉi diraĵo estas naskita longe post la Kongreso. Almenaŭ liaj ĝisdataj raportoj pri la evento en *La Ondo de Esperanto* montras plenan sukceson de tiu kongresa semajno. La unuan kaj solan fojon, speciale por partopreno en la Kongreso, Peterburgon vizitis la Majstro. En la salutparolado farita dum la Solena Malfermo, en la Aleksandra salono de la Urba Dumo por pli ol 600 kunvenintoj, li diris: "En la kongreso, kiu nun malfermiĝas, ne ekzistos konkurantoj kaj malamikoj, ne ekzistos humiligantoj kaj humiligatoj, ekzistos nur samideanoj kaj samregnanoj. Tial mi ĝoje salutas la unuan Ruslandan Esperantistan Kongreson; mi salutas ĝin duoble: kiel esperantisto kaj kiel ruslandano".⁴

Se mi estus kunordiganta la programon por nuntempa kongreso de rusiaj esperantistoj, supozeble mi povus simple kopii ĉiujn supre menciitajn demandojn de la Unua, ne malaktualigintajn eĉ post cent

jaroj – probable nur ŝanĝante kelkajn vortojn. Ĉar unueco en nia agado lamas ĝis nun. Ĉar la problemoj pri UK en Rusio plu aktualas nur kiel revo. Ĉar niaj klopodoj pri oficialigo de Esperanto daŭre flosas sur nivelo de pli aŭ malpli stultaj "paperkanonoj" ktp.

Kun preskaŭ centprocenta certeco eblas aserti, ke dum la lastaj jardekoj apenaŭ iu rusia esperantisto estis vizitinta la ĉefurban Dumon; superfluas diri, ke mia magra imago eĉ ne konturas ian kunvenon de esperantistoj tie.

La paciga alvoko de Zamenhof donas la ĝustan tonon por laboro de la tuta Kongreso. Ĉiuj diskutadoj pri la enprogramigitaj temoj pasas aferece kaj naskas akcepton de tre gravaj decidoj, i.a. pri establo de Esperanto-instituto, pri fondo de akcia societo por libroeldonado kaj librovendado, pri federacio de ruslandaj esperantistoj, pri ĉiujaraj landaj esperantistaj kongresoj, pri propagando de la lingvo...

Multaj el la decidoj akceptitaj de la Kongreso transformiĝis en realon. Efektive, ĉiutagajn bonenhavajn raportojn pri la Kongreso publikigis ĉiuj gravaj ĵurnaloj de la ĉefurbo, kaj tio tre pozitive influis la publikan opinion pri Esperanto. Eĉ la reakciuloj ne preterlasis la Kongreson, atentigante, ke "Esperanto estas unu el lailoj de framasonismo, servantaj por senpersonigo de la popoloj"⁵, do ankaŭ tiu parto de la publiko estis informita. Pli kaj pli da lokaj filioj organiziĝis kaj aliĝis al R.E.L. ĝuste post la kongreso. En oktobro 1910 en Moskvo, surbaze de la kongresa decido, kaj dank' al la persona entuziasmo de Saĥarov, estis malfermita Instituto de Esperanto, celanta dignan preparadon de Esperanto-instruistoj. Per la aŭtoritato de Postnikov aperis decido de la ŝtata Ministerio de Industrio kaj Komerco pri sendado de oficialaj reprezentantoj al la Internaciaj Esperanto-Kongresoj. Postnikov mem estis la unua reprezentanto, kiu per ŝtata subvencio partoprenis la kongreson en Vaŝingtono en 1910, kaj same per ŝtata subvencio publikigis la raporton pri tiu kongreso. Eĉ la posta aresto de Postnikov⁶ ne influis negative la opinion de la Ministerio pri la utilo de similaj oficvojaĝoj, kaj ĝi daŭre sendadis reprezentanton al la vicaj kongresoj – ĝis la unua Mondmilito. Kelkaj iniciatoj de la Kongreso restis nerealitaj pro diversaj kaŭzoj. Fiaskis la ideo pri la akcia societo pro manko de entuziasmo ĉe la monhavaj esperantistoj. Ne okazis la vica Kongreso en Moskvo en 1911 pro la juĝproceso de Postnikov kaj la oficiala fermo de R.E.L. ligita kun ĝi.

Tamen la pozitiva influo de la kongresaj decidoj restis forta en la landaj medianoj ankaŭ en la sekvaj jaroj; onidire en 1916 per grava agitado de esperantistoj estis pretigita decido de la Klerigministerio pri enkonduko de Esperanto en la lernoprogramojn de realernejoj kaj gimnazioj, do verŝajne Esperanto kune kun la lando havus multe pli helan vojon, se ne malhelpus la katastrofo 1917.

La historio de la Esperanto-movado en Rusio ne estas stabile sendorna. Dum la centdudekjara historio la landa movado travivis gravajn ascendojn kaj grandajn falojn, alfrontante minacajn defiojn pli ofte ol la movado en aliaj landoj, kontraŭstarante tiujn pli aŭ malpli sukcese, sed restante viva. Tio plej gravas. La Unua Ruslanda Kongreso sendube estas brila evento de nia historio. Mi supozas kaj esperas ke la rusia esperantistaro, vivanta kaj aganta unu jarcenton post tiu evento, en paco kaj interkonsento venos al sia 26-a Kongreso, kiu, omaĝe al la Unua, okazos en Sankt-Peterburgo majfine de 2010. Ĉu la rezultoj de tiu Kongreso akcelos la landan movadon almenaŭ ne malpli forte ol tion faris la Unua – ni vidu poste.

Mikaelo Bronŝtejn

1) Saĥarov A., *Rememoroj de 100% esperantisto*. Impeto, Moskvo, 1993.

2) *Ruslanda Esperantisto*, N-ro 2-3, 1910.

3) Saĥarov A., *Rememoroj de 100% esperantisto*. Impeto, Moskvo, 1993.

4) *Universala ĵurnalo*, Peterburgo, aprilo 1911.

5) *La Rusa Standardo*, 22.04.1910.

6) Pli detale legu en: Mikaelo Bronŝtejn, *Dek tagoj de kapitano Postnikov*, Tihvin, 2004.

**La lastan Zamenhof-tagon festis esperantistoj en multaj landoj.
Jen raportetoj pri kelkaj el ili (daŭrigo venontnumere).**

Armenio

La 17-an de decembro esperantistoj en Armenio solene festis la 150-an naskiĝtagon de L.L.Zamenhof. La festvespero okazis en la Jerevana klubo de Armena E-Asocio (AEA). Malfermis ĝin la prezidantino de AEA d-rino Susanna Bagdasarjan. Prelegon pri la aŭtobiografio de Zamenhof faris Hranto Danieljan. Prof. Gevorgjan reprezentis la historion de artefaritaj lingvoj kaj substrekiis, ke ĝis Esperanto estis kreitaj 800 kaj post Esperanto pliaj 100 projektoj. En la 19-a jarcento artefaritan lingvon "Sahlara" kreis la armena lingvisto Petros Tngrjan.

Programistino de la ministerio de ligo kaj transporto Anait Sargsjan proponis organizi E-kursojn en lernejoj, kiel fakultativan lernobjekton. Reprezentanto de Armena Societo de Kultura Ligo kun Eksterlando (AOKS) Stefan Dressler promesis subteni la Esperantan agadon.

Okaze de la jubileo en la centro de Jerevan Susanna Bagdasarjan kaj la pentristino Lusine Harutjunjan instalas standon pri la familio de Zamenhof.



Foto: Hrachja Babajan

Pri Esperanto kaj Zamenhof en la ruslingva ĵurnalo *Golos Armenii* (Voĉo de Armenio) la 24-an de decembro aperis granda artikolo kun bildoj de Nina Bjikjan, kun la subtitolo "La lingvo de speciala aŭro". **Susanna Gevorgjan**

Brazilo

Rio-de-Janeiro: Kvindekda personoj partoprenis en la Zamenhofa Festo de KKE la 18-an de decembro. La evento konsistis el salutparoladeto de Givanildo Ramos Costa, prezidanto de KKE, lanĉo de nova verko de Daniel Peliz, muzikaj kaj poeziaj recitaloj de Neide Barros Régio, Dulcydides de Oliveira Pinto kaj Therezinha Maria de Carvalho Pinto. En la fino oni festis la decembrajn naskiĝ-datrevenantojn. **Aloísio Sartorato**

Braziljo: La Zamenhof-festoj en la pola ambasadejo de la brazila ĉefurbo, kiuj estis tradicio en la naŭdekaj jaroj, ricevis novan impulson ĉi-jare, danke al la favora sinteno de la nova ambasadoro Jacek Junosza Kisdielewski, kiu invitis la lokajn esperantistojn por festi kune la 150-an datrevenon de la naskiĝo



de Zamenhof. Pli ol 80 esperantistoj plenigis la festan salondon de la ambasadejo vespere la 11-an de decembro. La evento estis motivo por inviti ankaŭ la senatanojn, kiuj jam aprobis la leĝ-proponon por la enkonduko de Esperanto en la brazilajn lernejojn, kaj la deputitojn, kiuj baldaŭ devos pritrakti la proponon de la senatano Cristovam Buarque. Post la bonvenigo de la ambasadoro, la prezidanto de la Brazilia Esperanto-Ligo prof. José Passini akcentis la grandajn historiajn meritojn de poloj por la progreso de la homaro, de Koperniko al Chopin, Marie Cury, Papo Johano Paŭlo la 2-a, kaj ne laste Zamenhof. Mesaĝo de la nepo de Zamenhof, d-ro Zaleski-Zamenhof, estis legata en la pola kaj Esperanto. Al la ambasadoro oni transdonis la librojn en la portugala lingvo: *La Zamenhof-Strato* de Roman Dobrzyński kaj *Defio de la lingvoj* de Claude Piron, kaj la libron de la prezidanto Passini. Georgo Handzlik prezentis sian monodramon pri la vivo de Zamenhof, kiu furoris en Bjalistoko. Pianludado de Chopin fare de la juna Lucian Ramos, kaj Jean kaj Lys Nardoto, kiuj kantis en Esperanto la ĥoron de Nabucco kaj la himnon de Eŭropo, finis la programon. Multaj ankoraŭ memoris la junajn gefratojn Nardoto de la arta vespero dum la UK en Tampere (1995). Nuntempe ili estas alte aprezataj profesiaj operkantistoj en Brazilo. Je la fino de la programo la ambasadoraj geedzoj regalis la ĉeestantojn per riĉa bufedo kaj ĝis preskaŭ noktomezo sur la granda teraso de la ambasadejo aŭdiĝis konversacioj kaj kantoj en Esperanto, akompanataj de la gitaro de la "Bardo sen Barbo" Georgo Handzlik. **Ursula kaj Giuseppe Grattapaglia**

Tajvano

La 2-an de januaro en la kutima kunsidejo, bela restoracio en la urbo Pingtung, okazis la Zamenhof-festo 2009, eble la plej lasta en la mondo. Ĉeestis pli ol 20 partoprenantoj el 7 landoj inkluzive de lernantinoj de E-kurso en la Pingrong-lernejo.

Komence ĉiuj kantis la himnon *La Espero* laŭ la gvido de s-ro Reza kaj la klavara akompanado de S-ro Jerry, pastoro, usona esperantisto loĝanta en Tajvano. Prof. Abengo raportis pri sia vojaĝo en Ĉinio kaj pri la 8-a ĉina E-kongreso.

Dum la paŭzo s-ro Reza legis salutmesaĝon de Lee Jung-Kee el KAEM, prezentis kelkajn lernolibrojn, gazetojn kaj diskojn kaj konsilis kiel membriĝi al UEA. S-ro Cesco Reale, italo el Svislando, kiu nun estas UEA-representanto ĉe UN pri lingvaj rajtoj kaj kultura diverseco, prelegis pri Esperanto kaj la lingva interŝanĝo. S-ino Anne Vernet el Francio prezentis sian provincon Alzaco kaj s-ino Flora Chen dividis impresojn pri la vojaĝo en Japanio en 2008. S-ino Hsueh Chang-hui, konata film-reĝisoro de Tajvano, montris tri dokumentajn filmojn pri Irano. S-ro Kevin, kiu vizitis Japanion en 2009 por partopreni la 96-an Japanan E-kongreson en Kohu, prezentis la vojaĝon kun fotoj.

Chuang Yin-hua



Guglo festis Z-tagon



Ankaŭ la fama interreta serĉilo Guglo festis la 150-an naskiĝdatrevenon de Ludoviko Zamenhof. La 15-an de decembro aperis en ĝia logotipo, en 33 lingvaj versioj tra la mondo, Esperanta flago. Apud la bildeto aperis ankaŭ la teksto "La 150-a naskiĝdatreveno de L. L. Zamenhof, fondinto de Esperanto", en la koncerna lingvo. Post alklako al la flago aperis serĉrezultoj por "Zamenhof" kaj "Esperanto". Guglo faris al Esperanto grandan reklamon, kio tuj montriĝis en la nombro de la vizitataj paĝoj pri Esperanto. Ekzemple la servilon *lernu!* vizitis en tiu tago anstataŭ la kutimaj 5 000, sesoble pli da unikaj vizitantoj (26 000), kaj la intereso estis pli granda ankaŭ en postaj tagoj.



La poetino Esther Schor parolas pri Zamenhof kaj judaj influoj de tiu tempo, ekz. cionismo kaj hilelismo.

Simpozio en Novjorko

Posttagmeze la 15-an de decembro, la UEA-oficejo en Novjorko gastigis simpozion por festi la 15-an datrevenon de la naskiĝo de L. L. Zamenhof.

Ĝi okazis, anglalingve, en la konstruaĵo ĉe 777 UN-Placo, rekte trans la strato de la ĉefsidejo de Unuiĝintaj Nacioj. La pola ambasadoro al la UN, Andrzej Towpik, ne povis ĉeesti, sed li sendis salutan, bonvenigan leteron, kiu interalie diris:

"Mi sincere dankas vin pro la afabla invito ĉeesti la malfermon de la Zamenhofa Simpozio la 15-an de decembro, kaj fari mallongan, enkondukan paroladon. Mi sentas min tre honorigita pro tiu invito, kaj estus por mi granda plezuro esti kun vi je tiu okazo. Malbonŝance mi ne povas ŝanĝi miajn antaŭe faritajn devontigojn de tiu horo, kion mi bedaŭras. Bonvolu akcepti miajn bondezirojn por Universala Esperanto-Asocio kaj por vi mem, kaj ankaŭ por la simpozio. Mi certas ke ĝi estos grava omaĝo al L. Zamenhof, granda homo, kaj kiel vi ĝuste esprimas en la titolo de la simpozio – 'novenkondukinto kaj humanisto.'"

La prelegantojn enkondukis Thomas Eccardt. Komencis Esther Schor, poetino kaj profesorino ĉe Princeton-Universitato, kiu parolis pri Zamenhof kaj la diversaj judaj influoj de tiu tempo, ekz. cionismo kaj hilelismo. Arika Okrent, verkistino de la libro *En la lando de inventitaj lingvoj: Esperantaj rokmuziksteluloj, klingonaj poetoj, loglanaj amantoj, kaj la frenezaj revuloj kiuj penis konstrui perfektan lingvon*, prelegis pri Zamenhof kaj humileco. La psikiatro James Lieberman prelegis pri psikologiaj aspektoj de Zamenhof kaj lia estrecofilozofio. Timothy Reagan, profesoro ĉe la Centra Konektikuta Ŝtatuniversitato, parolis pri lingvokonstruado. Humphrey Tonkin, emeritiĝinta profesoro ĉe la Universitato de Hartford kaj eksprezidanto de la UEA, parolis pri la legaco de Zamenhof.

Proksimume sepdek homoj ĉeestis, inkluzive de la ambasadoro de Benino Jean Francis Zinsou, kelkaj ĵurnalistoj, membroj de aliaj neregistaraj organizaĵoj, regionaj esperantistoj kaj aliaj interesataj homoj. La prelegojn sekvis akcepto kun vino kaj fromaĝo. La tuta simpozio estis surbendigita kaj baldaŭ haveblas interrete.

Scott Page

100-jariĝo en Gliwice

Pli ol 100 jarojn funkcias Esperanto en la pola urbo Gliwice. Jam en 1905 en la tiama germana urbo Gleiwitz vivis unuopaj esperantistoj. En majo 1909 komencis sian funkciadon ĝia loka Esperanto-grupo.

Gleiwitzaj esperantistoj partoprenis jam tiam en diversaj renkontiĝoj, interparolis persone kun ges-roj Zamenhof, partoprenis en la 8-a UK en Krakovo kaj agadis en diversaj grupoj. Multajn faktojn pri tio oni povas trovi en germanaj Esperantaj muzeoj.

Por rememori tiun jubileon la Glivicea filio de PEA en novembro 2009 okazigis sian tradician renkontiĝon GRUPE-13. Venis kvardeko da esperantistoj el kelkaj polaj urboj kaj gastoj el la partnera urbo Dessau en Germanio. La gastoj transdonis salutleteron de la urbestro de Dessau al la urbestro de Gliwice. La urban estraron reprezentis la sekretario de la urba estraro Andrzej Karasiński kaj la prizorganto de la muzeo de la radiostacio en Gliwice Andrzej Jarczewski.

Vendrede la 6-an de novembro estis malfermita porokaza ekspozicio, en kiu oni montris materialojn litajn kun la E-movado dum la pasintaj cent jaroj. Samtage ankaŭ la gasto el Germanio Gerhard Hirschmann prelegis pri kunlaboro inter Eŭropo kaj Afriko. Sabate, krom informoj pri nia movado, la partoprenantoj aŭskultis interesan prelegon de Roman Dobrzyński pri la historio de la pola himno. Sabate vespere oni spektis la monodramon *Ludoviko Lazaro*, prezentatan de Georgo Handzlik.

La partoprenantoj povis spekti du interesajn filmojn de Roman Dobrzyński pri la IJK en Zakopane kaj pri partnereco de la urboj Góra (PL) kaj Herzberg (DE).

Dimanĉe oni povis, laŭ invito de la Muzeo-Radiostacio en Gliwice, aŭskulti interesajn rakontojn pri mitoj kaj faktoj, lititaj kun la fama hitlera provoko en septembro 1939, okazinta en la radiostacio. Oni devas menci, ke s-ro Jarczewski jam en marto 2009 eldonis libron pri tiu temo, titolitan *Provokado*, dediĉitan al la 100-jara jubileo de Esperanto en la urbo Gliwice.

Multaj el la partoprenantoj promesis veni ankaŭ venontjare por festi la eniron en la duan jarcenton de la Esperanta agado en Gliwice.

Stanisław Mandrak



KOTIZTABELO DE UEA POR 2010

La jenaj tarifoj validas ankaŭ por postaj jaroj, se la pago estos farita antaŭ la 30-a de septembro 2010.

Lando/valuto	MG	MJ(-T)	MA(-T)	SA	Kto	SZ
Aŭstralio/dolaro	16	40	100	60	36	200
Aŭstrio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Belgio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Brazilo/eŭro	5	12	30	18	11	60
Britio/pundo	8	20	50	32	19	100
Ĉeĥio/krono	170	420	1050	670	400	2100
Danio/krono	70	180	450	285	170	900
Estonio/krono	105	260	650	415	250	1300
Finnlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Francio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Germanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Greklando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hispanio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Hungario/forinto	1700	4300	10750	6850	4100	21500
Irlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Islando/eŭro	10	24	60	36	22	120
Italio/eŭro	10	24	60	38	23	120
Japanio/eno	1300	3200	8000	4800	2900	16000
Kanado/dolaro	14	35	87	52	31	174
Latvio/lato	4	11	27	17	10	54
Litovio/lido	20	50	130	80	50	260
Nederlando/eŭro	10	24	60	38	23	120
Norvegio/krono	80	200	500	300	180	1000
Nov-Zelando/dolaro	20	50	125	75	45	250
Pollando/zloto	25	60	150	95	55	300
Portugalia/eŭro	8	20	50	32	19	100
Rusio/eŭro	5	12	30	18	11	60
Slovakio/eŭro	7	17	42	27	16	84
Slovenio/eŭro	8	20	50	32	19	100
Svedio/krono	95	240	600	380	230	1200
Svislando/franko	15	38	95	57	34	190
Usono/dolaro	13	32	80	48	29	160
TARIFO A/eŭro	6	16	40	24	14	80
TARIFO B/eŭro	5	12	30	18	11	60

ALIAJ LANDOJ: Luksemburgo laŭ Belgio; Kipro kaj Malto laŭ Slovenio.

TARIFO A: Bahamoj, Honkongo, Korea Respubliko, Singapuro, Sud-Afriko, Tajvano.

TARIFO B: Ĉiuj ceteraj landoj ne jam menciitaj.

MG: Individua Membro kun Gvidlibro tra la Esperanto-movado.

MJ(-T): Individua Membro kun Jarlibro (kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membro de TEJO kun la revuo *Kontakto* sen plia abonpago).

MA(-T): Individua Membro-Abonanto kiel MJ(-T) plus la revuo *Esperanto*.

DM(-T): Dumviva Membro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MA; ricevas la Jarlibron, la revuon *Esperanto*, kaj ĝis inkl. 29 jaroj, la revuon *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*.

DMJ(-T): Dumviva Membro kun Jarlibro: pagas por la tuta vivo 25-oblon de la kotizo MJ; ricevas la Jarlibron kaj ĝis inkl. 29 jaroj, membrecon en TEJO kun *Kontakto* kaj *TEJO tutmonde*.

SA: Simpla abono al la revuo *Esperanto*, sen membreco en UEA.

Kto: Abono al la revuo *Kontakto*, sen la membreco en UEA/TEJO.

SZ: Kotizo por Societo Zamenhof: mecenata kategorio (aldoniĝas al alia kotizo; ne inkluzivas membrecon en UEA).

PT: Patrono de TEJO: pagas 3-oble la kotizon de MJ(-T) por subteni TEJO (ne inkluzivas membrecon); ricevas la revuon *Kontakto* kaj aliajn eldonaĵojn de TEJO.

Scienca triopo el Mezeŭropo

Fakaj studoj en Esperanto. Red. Zdeněk Pluhař. *Serio: Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (AEST)*, [vol. 3]. Kolekto de kontribuajoj prezentitaj dum KAEST 2002 (Konferenco "Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko", Dobřichovice, Ĉeĥio, 2002-11-08/10). Dobřichovice: KAVA-PECH, 2003. 146p. 20cm. ISBN 8085853639. Ilus. Prezo: € 15,00. **Fake pri Esperanto kaj Esperante pri sciencoj.** Red. Zdeněk Pluhař. *Serio: Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (AEST)*, [vol. 4]. Kolekto de kontribuajoj prezentitaj dum KAEST 2004 (samloke, 2004-11-12/14). Dobřichovice: KAVA-PECH, 2005. 84p. 20cm. ISBN 8085853787. Ilus. Prezo: € 9,50. **Lingvo kaj Interreto kaj aliaj studoj.** Red. Zdeněk Pluhař. *Serio: Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko (AEST)*, [vol. 5]. Kolekto de kontribuajoj prezentitaj dum KAEST 2006 (samloke, 2006-11-10/12). Dobřichovice: KAVA-PECH, 2007. 134p. 20cm. ISBN 9788085853933. Ilus. Prezo: € 15,00

Ĉu taŭgas Esperanto por interkomunikiĝi ankaŭ science kaj tehniko? La tri ĉi-supraj volumoj el la dua AEST-serio liveras pri tio unuavide klaran, 364-paĝan respondon. Se ne alkalkuli la tri antaŭparolojn de la nelacigebla redaktoro, Zdeněk Pluhař, la tri volumoj ja prezentas ĝuste 50 kontribuajojn esperantlingvajn de 37 profesiuloj el diversaj sciencaj kaj teknikaj fakoj kaj agadkampoj. Signife 11 inter tiuj aŭtoroj kontribuas pli ol unufoje; rekordas Jan Werner pro kvar verkaĵoj.

Tuj rimarkindas ke preskaŭ senescepte temas pri artikoloj, sufiĉe mallongaj (mezume 6,32-paĝaj), kiuj celas ne nur samfakajn kolegojn, sed legantaron pli vastan. Krom tio la artikola enhavo plejparte interesus antaŭ ĉio esperantujanojn agemajn, ĉar la imageble granda tema disperso en la trivoluma opo konstateble faskiĝas je **tri agigaj temfokuso**j aktuale gravaj en nia medio:

- 1) terminologio-esperantologio (21 artikoloj),
- 2) informadiko-Interreto (18 artikoloj) kaj
- 3) ekologio-daŭriva evoluigo (9 artikoloj).

La temfokusa triopo aperas en ĉiu el la tri volumoj, eĉ se la ĉiuvolume malsama artikola arigo far la redaktoro sub tri aŭ du sekciaj titoloj tion ne tuj evidentigas. Efektive nur du artikoloj, unu de Frank Nietzsche kaj alia de Rodica Giuhat (ambaŭ en vol. 3, sekcio C), ne estas atribueblaj al unu el la tri temfokuso. Pretere, dezirindus ke la volumaj numeroj aperu titolpaĝe kaj kovrile; ankaŭ aldona listo klare indikanta la jam aperintajn volumojn, almenaŭ de la nova, se ne de ambaŭ AEST-serioj, estus utila.

La teman buntan de la tri volumoj, eĉ trifokusan, nepretervideble tamen kunligas unu fadenon, kvazaŭ **lingva supertemo**, kiu pravigas la serian titolon *Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko*: nome krom la atendebla multtema reala uzado de Esperanto, ankaŭ la eble surprize vasta traktado de ties problemeco. Problemeco kiu manifestiĝas kiel granda **manko je Esperantaj faklingvaĵoj** – terminaroj kaj tekstoj – kaj kiun pritraktas, detale aŭ nur alude, krom du redaktoraj antaŭparoloj (vol. 3 kaj 4), preskaŭ la duono de la artikoloj. Simile ankaŭ

la kontribuajoj kies fokuso estas la informadiko aŭ specife la Interreto, superrege pritraktas la praktikon kaj problemecon de la aplikado de Esperanto tiukampe. Tamen, spite la evidentan ĝeneralan problemecon de Esperanto kiel scienc-tehniko lingvo, bona novaĵo: ĉiuj tri volumoj abundas je uzeblaj, imitindaj, foje eĉ imitendaj solvo-aliroj rilate la Esperantan terminografion kaj precipe rilate la perkomputilan traktadon kaj aplikadon de Esperanto. Ke la komputiko povas faciligi kreadon de terminaroj kaj vortaroj ja estas sufiĉe vaste konate, sed ĝuste pri tio kiel konkrete apliki la komputilajn rimedojn al Esperanto, la voluma triopo liveras konsiderindan informaron. Ĉi-sekve eblas prilumi

nur kelkajn detalojn el la riĉa trivoluma enhavo.

La artikolara fasko reprezentanta la **terminologian-esperantologian temfokuson** manifestiĝas en 3B-C (= vol. 3, sekcioj B kaj C), en 4A-B kaj en 5B. Tiufaske viciĝas terminologiaj studoj pri jenaj kampoj: politiko, matematiko (nur resume), ekonomiko, forstofako, fungologio, interlingviko (3B); konstrufako (3B kaj 5B); fervojoj, teatra fako (4A); metrologio (nur resume, artikolo elŝutebla interrete) kaj maŝinfako (5B). Samfaske, en 3C, elstaras prava pasia alvoko de Jan Werner, "Ĉesigi la disipadon de fakula

energio en la movado" (postulanta la konservadon de valoraj terminologiaj laboraĵoj jam elfaritaj, sed ĝis nun ne publikigitaj); krome grava historia skizo far Rüdiger Sachs pri *Scienca Revuo*. En 4A speciale rimarkiĝas diskutinda tezo, ankoraŭfoje de Jan Werner, ke Esperanto malkiel etnaj lingvoj ne evoluu libere, sed ke ĝi, estante planlingvo, estu daŭre priplanata, almenaŭ en sia funkcio kiel scienc-tehniko komunikilo. Samloke Detlev Blanke subteninde substrekas la neceson ke oni plilarĝigu la studadon de la faklingva interkomunikado, ne limigante sin al nuraj terminologiaj konsideroj, sed ekzamenante la tutan fakan lingvaĵon kaj ties diversajn funkciojn kaj uzocirkonstancojn (aliro parenca al la postvustera sociterminologio). Laste menciindas ĉi-faske, en 5B, historia trovaĵo de Wera Blanke el la komencaj jaroj



de *Scienca Revuo* kaj de ISAE: detale ellaborita, siatempe nur ekrealigita, sed ankoraŭ inspira agadplano pri vastskala kreado kaj normigado de scienc-teĥnikaj terminoj far renomaj fakuloj-esperantistoj.

Koncerne la **temfokuson informadiko-Interreto**, ties artikolara fasko aperas en 3A kaj C, en 4A kaj en 5A-B. Ekster malgranda nombro da artikoloj traktantaj nelingvajn aspektojn informadikajn – mikroprocezojn, fervojojn (3A); medicinon (3C) – ĉiuj tiufaskaj kontribuoj estas grandparte ankaŭ prilingvaj. Antaŭ ĉio tio validas ĉe la du laborinstigaj kontribuoj de Josef Hron (en 4A, daŭrigo en 5B): detalaj raportoj pri lia (kiel li diras modeste) "kompilado" de "Granda Vortaro Esperanta-Ĉeĥa" (GVEĈ) ampleksanta pli ol 100 000 artikolojn inklude de dekmiloj da terminoj, notinde biologiaj kaj medicinaj. Liaj du kontribuoj sidas ĉi-faske nur tial ke li klarigas, kiel esencan parton de sia detala labormetoda priskribo, la efikan aplikadon de specifaj komputilaj programoj ĝenerale konataj (ekscelo kaj vordo de Microsoft). Prave li alvokas kompetentajn laboremulojn imiti lian entreprenon por aliaj paroj de Esperanto kaj etna lingvo.

Inter la multaj aliaj interesaj eroj de la informadika-interreta artikolaro aparte menciindas la praktike utilaj kontribuoj de Marc Bavant pri "Apliko de XML al fakaj laboroj pri Esperanto" (4A) kaj de Marek Blahuš pri "Unikodo – Esperanto de Interreto" (5A); krome du informriĉaj artikoloj pri Esperanto@Interreto (mallonge E@I), unu de Martin Minich (4A) kaj alia de Peter Baláž kaj Clayton Smith (5A); fine kunlaborinstiga informajo de Pavla Dvořáková pri "Multlingvaj tradukvortaroj en Interreto" (5A).

La tria artikolara fasko – la plej malgranda, sed ne la plej malgrava –, kiu prezentas la **temfokuson ekologio-daŭriva evoluigo**, troveblas en 3C, 4B kaj 5C. Rimarkigas tri kontribuoj pri aktuale grava temo, ekoturismo: unu de Petr Chrdle (3C) kaj du de Bojidar Leonov (3C kaj 4B). Tri aliaj artikoloj etendas la fokuson ekstereŭropan: du de Rüdiger Sachs pri parazitologio (4B) kaj mediprotektado en Afriko (5C); unu de Lene kaj Jan Niemann pri la Unesko-programo "Monda Heredaĵo" en Gronlando (5C). Samfaste frapas engaĝiginta kontribuaĵo de Manfred Westermayer pri la mondampleksa Agendo 21, rezulto de la Tutmonda Pintokonferenco pri Medio kaj Evoluo, okazinta en Rio-de-Ĵanejro en 1992; pri ties eŭropkadra sekvo, la Ĉarto de Aalborg de 1994 kaj 2004; kaj detale pri la serioza, sistema aplikado de ambaŭ dokumentoj en la germana urbo Frejburgo (5C).

Kiel supre menciite, Esperanto ja malriĉas je scienc-teĥnikaj tekstoj kaj bone ellaboritaj terminaroj – breĉo kiun ŝtopi signife helpas tiuj ĉi tri volumoj (post jamaj aliaj el la du AEST-serioj). Dume rimarkindas des pli la ĝenerale alta **lingva kvalito** de la Esperantaj tekstoj prezentataj. Kaj nur malofte tie ĝenetas kelkaj evidentaj prezeraroj facile korekteblaj. Tamen menciendas unu escepta lingvokvalita nadiro (en 3C): unupaĝa artikoleto de Ljubiša Preparadović k.a., "Antaŭvido de migreno ĉe malsanuloj aplikante [tiel!] la teknikojn *data mining*". Krom

duba sintaksero, la anglismo *teknikoj* (kutime: *procedoj*) kaj la krude angla termino *data mining* (unu ekvivalento: *datumelfoso*) – mirigas tiupaĝe ankaŭ jena fremdaĵo: "Ĉi tiu malsano... ne estas adekvata al la mortado..."

Kontraste al la ĝenerale zorga redaktado de la Esperantaj tekstoj, dubindas la informa kaj lingva kvalito de konsiderinda nombro da **anglaj resumo**j. Laŭ la ĉekapaj bibliografiaĵoj, la artikolojn ja akompanas ĉiuvolume resumo(j) anglaj, germanaj kaj ĉeĥaj; ekde volumo 5 ankaŭ francaj. Aldone en kelkaj kazoj la aŭtoro mem liveras enkondukan resumon esperantlingvan. Dum la germanaj kaj francaj resumo(j) tute adekvate kaj profesie, fakte

ĝenerale bonege kaj alloge, prezentas la koncernan artikolan enhavon – la kvaliton de la ĉeĥaj mi ne povas sufiĉe pritaksi, sed mi neniel dubas pri ilia taŭgo –, la anglaj resumo(j) tro ofte lamas. Foje ili estas kondensitaj ĝis nekompreneblo (4A, p. 24-25, 28) aŭ markitaj per strangaj aŭ stile maltaŭgaj esprimoj (3B, p. 62; 4A, p. 35, 54; 5A, p. 53; 5B, p. 99; 5C, p. 116, 128); unu distingiĝas eĉ per naŭ korektendoj (5B, p. 73). Tiaj malzorgaj anglalingvaj tekstetoj, kiuj jen ne sufiĉe informas aŭ eĉ rekte misinformas, jen uzas fremdan aŭ maltaŭge familieran stilon, povas indiki al neesperantlingvano ke temas nur pri amatoraĵo ne eniginda

en seriozan fakan datumbazon. Pro la nuna superpeze grava rolo de la angla kiel scienc-teĥnika komunikilo kaj kribrilo, evidente nepras publikigi altnivelajn resumo(j) ankaŭ tiulingvajn.

Se konsideri la tuton de la valora enhavo de la voluma triopo kaj ĝian ĝenerale zorgan editoradon, la organizantoj kaj la partoprenantoj de la AEST-konferencoj ja estas gratulindaj kaj subtenendaj pro tio ke ili regule – nun ĉiun duan jaron – tiel demonstradas la faklingvan funkciivon de Esperanto. Samtempe

gratulindas kaj subtenendas ankaŭ la duaseria eldonisto, Petr Chrdle, pro tio ke li samregule produktadas, eĉ belforme, la konferencajn aktojn por ilin rapide disponigi al pli vasta fakularo kaj laikaro. Tamen ĝuste pro la intencata disvastigo de la aktoj al kulture, religie kaj politike tre diversa tutmonda publiko, mi havas rezervon pri la taŭgo kaj akceptindo de la **kovrilaj desegnoj** far la renoma ĉeĥa artisto Luděk Neuzil. Unuflanke, tute taŭge, ilia alĥemia simbolismo – kun motivoj interalie de tero/ĉielo, homkorpoj/ĉielkorpoj, likvo-transigo – leĝere kontraŭpezas la supozeble sobre

sekan interkovrilan enhavon de la scienc-teĥnikaj tekstoj. Tiuj desegnoj krome trafe signas la pragecon kaj de la lastatempaj AEST-konferencoj kaj de ties organizejo-eldonejo KAVA-PECH; la moderna eŭropa kulturcentro Prago iam ja estis "eŭropa metropolo de la alĥemio". Aliflanke ĝuste tiu kovrilarta leĝero ne kongruas, ĉe certaj eventualaj legantoj, kun la efektiva serioza teksta enhavo; simile ankaŭ la alĥemia simbolismo, se rekonita, ĉe iuj same misrepresas la severe scienca-teĥnikan interkovrilaĵon. Sed antaŭ ĉio la abunda surkovrila nurvirina nudeco ne estas universale akceptinda. Por glate disvastigi la gravajn laboraĵojn de la AEST-konferencoj, ŝajnas oportune arte garni ilin malpli diskutinde.

Edmond Brent



Gvidilo por Roterdamo: simpatia kaj konvena

Tuj apude. Gvidilo tra la kvartalo de la Centra Oficejo de UEA. Humphrey Tonkin.

Rotterdam: UEA, 2008. 56p. 20cm. ISBN 9789290171065. Prezo: € 7,50

Pri kelkaj libroj oni vere miras ke ili ne aperis jam antaŭ jaroj. Ĉu ne estas tute okulfrappe ke malmulto estas tiel senchava kiel esperantlingva gvidlibro tra Roterdamo? Humphrey Tonkin entreprenis tion okaze de la Universala Kongreso de 2008, komune kun Peter Bulthuis kaj Francisco Veuthey.

La libreto estas en gvidila formato kaj elradias decan kvaliton. Kompare kun multaj nacilingvaj modernaj gvidiloj ĝi kompreneble estas maldika, senkolora kaj en iom simpla komposto. Sed la profesieca aspekto garantias ke la esperantlingva turisto certe ne devas honti pro ĝi. La manko de kria bunteco kaj disigo de la teksto al plej eble malgrandaj eroj estas fakte tute simpatia.

Tonkin, kiu tiom ofte vizitis Roterdamon kiel estrarano, bedaŭris ke li kutime estis tro superŝarĝita de taskoj por povi multe esplori la ĉirkaŭon de la Centra Oficejo. Tamen la leganto de *Tuj apude* ricevas la impreson ke pur-rasa roterdmano prezentas sian kvartalon. La informplena libreto havas plaĉan stilon, eble iom tro postuleman por la subaveraĝa

esperantisto, sed ĝi estas ĝenerale bone legebla kaj konvena por la ambicia kaj interesita turisto.

La libreto rekomendas kvar promenojn, kies komencpunkto estas la Centra Oficejo, Nieuwe Binnenweg 176. La unua gvidas al la muzeoj sude de la oficejo, la dua iras norden en direkto de la centra stacidomo, la tria prezentas la okcidenton kun la ĉarma malnova Delfshaven. Kvare oni ekscias pri la haveno kaj la eblo konatiĝi kun tiu ĉi parto de la centro per boato. Ne senkiale Roterdamo estas nomata ankaŭ "Manhattan aan de Maas" (Manhattan ĉe Mozo).

Oni povas imagi sin trairanta Roterdamon kun la tonkina gvidilo en la mano, legante pri la arkitekturo pri certaj domoj, pri iamaj loĝantoj, ĝenerale pri la historio kaj interesaj lokoj. Kaj ankaŭ Esperanto ne mankas, ĉu rilate al nia domo, ĉu al la Zamenhof-stratoj kaj la loka klubo. Danke al Tonkin ne plu necesas ignore preterpasi ĉion ĉi.

Ziko van Dijk



Bonvena kaj rekomendinda libro por infanoj

Rim-enigmoj. Elena Popova. Ilustris Miroslava Tomečková. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. 52p. 14x20cm. ISBN 9788087169070. Prezo: € 5,40

En la lastaj jaroj la kvanto de porinfanaj E-libroj, inter kies prezo kaj kvalito estas deca rilato, falis draste. Inter tiuj kiuj aperas, ne malmultaj estas tro kostaj aŭ/kaj lingve kaj aspekte subnivelaj. La *Rim-enigmoj* de Elena Popova certe ne estas inter tiuj ĉi. Lingve ĝi estas preskaŭ senripoĉa (la jen-kaj-jena manko de artikolo en la enkondukaj tekstoj estas bone konata trajto de tekstoj verkitaj de slavlingvanoj) kaj preze tute akceptebla, se enkalkuli la altan teknikan kvaliton.

La aŭtorino de la enigmoj verkas ne nur en la internacia, sed ankaŭ en sia denaska lingvo, la bulgara. Ĝiajn tekstojn en tiu ĉi libreto ilustris la bone konata ĉeĥa desegnistino Miroslava Tomečková, kaj la libron eldonis unu el niaj plej profesiaj eldonejoj, la ĉeĥa KAVA-PECH. Ĉio ĉi devas esti garantio pri altkvalita kaj utila libro.

Ĝi prezentas 34 mallongajn enigmojn versformajn, ĉiun el ili ilustrita per nigrablanka desegnaĵo. La leganto devas enskribi sur la lastan linion de la enigmo la solvon

kaj kolorigi la desegnaĵojn. En la kolofono estas eĉ spaco speciale rezervita por enskribi la nomon de la leganto kiu plene kaj ĝuste solvis la enigmojn kaj kolorigis iliajn akompanajn desegnaĵojn. Tiel, ŝi aŭ li fariĝas speco de "kunaŭtoro" de la libro.

Por tiuj kiuj ne mem malkovras la solvojn, tiuj ĉi estas listigitaj fine de la libro, kune kun tradukoj en 12 lingvoj.

Laŭvole, sub la solvo E-lingva, oni povas enskribi ankaŭ ĝian tradukon en la lingvo de la solvinto, se ĝi ne estas inter la aliaj 12.

La tekstoj mem, eĉ se ne verkitaj por veraj komencantoj, ne estas aparte malfacilaj kaj, tre grave, ne estas tro longaj. Tio povas instigi al serĉado en vortaro aŭ alia informfonto (ekz. la interreto). La libreton oni povas uzi tute sola, eventuale kun helpo de pli sperta apudulo, aŭ en grupo, ekzemple por stimuli al konkurado. Ĝi certe estas taŭga ankaŭ kiel donaco, kiu ne kuŝaĉos sur librobreto poreterne. Ĝi ja estas bonvena kaj rekomendinda aldono al la libraro nialingva.

Ionel Oneț



LA SUBAJN TITOLOJN MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bv. atenti ke por varoj sendotaj al adresoj en Eŭropa Unio al ilia neta prezo aldoniĝas aldonvalora imposto: 6% por libroj kaj periodaĵoj kaj 19% por ĉio alia. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por sendokostoj (minimуме 4,00 eŭroj). Antaŭdankon pro via mendo! Ĝisdata katalogo de haveblaj varoj estas ĉe www.uea.org/katalogo/.

Abolo de la laboro, La.

Bob Black. Paris: SAT. 36p. 21cm. Revolucia teksto pri la malneceso de laboro. € 3,00

Antologio latina. Volumo 3:

Julia-Klaŭdia Dinastio (ĉ. 10 – ĉ. 75 p.Kr.). Kompilis kaj en Esperanton trad. G. Berveling. Chapecó: Fonto, 2009. 217p. 21cm. € 20,10

Arto labori kune, La.

Festlibro por Humphrey Tonkin. Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA, 2010. 901p. 26cm. Bind. Ilus. ISBN 9789290171133. Panorama kolekto de diversstemaj artikoloj de 106 aŭtoroj, eldonita okaze de la 70-a datreveno de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la lastaj jardekoj. € 60,00. Triona rabato ekde 3 ekz.

Beletra Almanako 6.

(Oktobro 2009). Red. J. Camacho, P. Daŝgupto, I. Ertl. Novjorko: Mondial, 2009. 171p. 22cm. Ilus. ISBN/ISSN

9781595691446/19373325.

Prozo, debatoj, eseoj, recenzoj, rezultoj de Belartaj Konkursoj. Ĉio originala! € 9,90

Desegnita humuro / Kreslený humor / Cartoon Humour / Humor mit dem Zeichenstift.

Pavel Rak. En Esperanton trad. M. Malovec. Dobřichovice: KAVA-PECH, 2009. 127p. 17cm. Tekstoj en la ĉeĥa, angla, germana kaj Esperanto. ISBN 9788087169131. Elektitaj desegnaĵoj de profesia karikaturisto kaj ilustristo de eldonaĵoj. € 7,20

Ekonomia krizo. Analizo

n-ro 2. Diversaj. Kompilis kaj en Esperanton trad. V. Lutermano. Embres-et-Castelmaure: MAS, 2009. 81p. 21cm. ISBN 9782918300120. Pliaj materialoj rilataj al la nuna ekonomia krizo, plejparte el politike maldekstra perspektivo. € 7,50

Esperanto de A à Z, L'.

André Cherpillod.

Courgenard: La Blanchetière, 2009. 87p. 21cm. ISBN 2906134856. Franclingva enciklopedieca prezento de faktoj, lokoj, personoj, eventoj k.s., kiuj prilumas la fenomenon Esperanto. € 5,10

Esperanto mutkattomasti.

Stano Marček. Ilustris Linda Marčeková. En la finnan trad. T. Grundström. Martin: La aŭtoro, 2009. 114p. 25cm. ISBN 9788089312146.

Komplete ilustrita 22-leciona kurso por finnlingvanoj, kun vortaretoj ambaŭdirektaj. € 7,50

Esperanto und andere Sprachen im Vergleich.

Red. Sabine Fiedler. Berlin: Gesellschaft für Interlinguistik, 2009. 185p. 30cm. Germanlingva. ISSN 14323567. Dek du kontribuajoj al la jara kunveno de la Asocio por Interlingvistiko, 21-23 novembro 2008. € 20,10

Feliĉu, eblas! Omraan

Mikhaël Aïvanhov. Trad. el la franca. Fréjus: Prosveta, 1996. 28p. 21cm. ISBN




2855665795. Mallongaj tekstoj kiuj helpu la leganton pli bone kompreni sin kaj pli bone disvolvi sian vivon. € 1,20

Fondaj tekstoj de Esperanto, La / Les textes fondateurs de l'espéranto.

André Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2009. 28p. 21cm. Du-lingva (E, franca). Atenta analizo de "La unua libro" kaj de la "Fundamento de Esperanto". € 2,40

For la Neŭtralismon!

Eŭgeno Lanti. Paris: SAT. 28p. 21cm. Fundamenta teksto de la ne-neŭtrala E-movado, unuafoje publikigita en 1922. € 2,40



Ho, mia kor'. Melodioj laŭ poemoj de Zamenhof. Toyoaki-si: Beltono, 2009. 72p. 26cm. Tekstoj kaj muziknotoj por 22 poemoj verkitaj aŭ tradukitaj de L.L. Zamenhof. € 6,90

Kamus bahasa esperanto. Esperanto-indonezia vortaro. Hazairin R. Junep. Yogyakarta: Centro de Esperanto-Studoj, 2007. 182p. 20cm. ISBN 9789791659604. € 9,90

Kiel traduki sesdek franclingvaj vortojn. André Andrieu. Paris: SAT-Amikaro, 2009. 146p. 21cm. Ilus. ISBN 9782952575317. Tre utila helpilo por tiuj kiuj tradukas el la franca en Esperanton. € 10,20

Kompendio de la Kapitalo de Karlo Markso. Carlo Caffero. Antaŭparolo de James Guillaume. El la franca trad. P. Levi. Paris: SAT, 2009. 155p. 18cm. ISBN 9782918053002. Kvazaŭa resumo, en lingvaĵo komprenebla por la larĝa publiko, de fundamenta verko pri kapitalismo. € 11,40

Kunci Esperanto. Kompilis Heidi Goes kaj Bobby Mulyadi. Rotterdam: UEA, 2009. 48p. 15cm. ISBN 9789290171119. Nova, moderna ŝlosilo indonezia. € 1,20. Triona rabato ekde 3 ekz.

Laksigo de Bebo, La. Georges Feydeau. El la franca trad. A. Cherpillod. Courgenard: La Blanchetière, 2010. 63p. 21cm. ISBN 2906134864. Humura teatraĵo, en kiu la aŭtoro primokas stultecon, egoismon, hipokritecon, senvalorecon, memsufiĉecon. € 6,00

Lazzaro Ludovico Zamenhof. Antologia. Red. Carlo Minnaja. Milano: IEF,

2009. 301p. 21cm. ISBN 9788896582008. Itallingva antologio de tekstoj de/pri Zamenhof, eldonita okaze de lia 150-a datreveno. € 23,40

Lingua e un popolo, Una. Problemi attuali del movimento esperantista. Humphrey Tonkin. Enkonduko kaj notoj de Carlo Minnaja. El Esperanto trad. E. Belluco. Venafro: Eva, 2009. 170p. 21cm. ISBN 9788896028117. Itallingva versio de *Lingvo kaj popolo*. € 18,00

Malamu vin, unu la alian. Manuel de Seabra. Novjorko: Mondial, 2009. 223p. 22cm. ISBN 9781595691439. Mozaika romano, certagrade aŭtobiografia. € 16,50

Multlingva frazlibro. Yohanes Manhitu. Rotterdam: Oceania Komisiono de UEA, [2009]. 143p. 21cm. Centoj da esprimoj grupigitaj laŭ temoj, en la lingvoj Esperanto, indonezia, davana, tetuma, kupanga, angla, franca, hispana, portugala. € 7,50. Triona rabato ekde 3 ekz.

Odkryj esperanto. Fascynujący język. El Esperanto trad. Cz. Żadziłko. E@I, 2009. 22p. 24cm. Kolorilus. Pollingva versio de *Malkovru Esperanton*. € 1,50

Opdag esperanto. Et medrivende sprøg. Trad. el Esperanto. E@I, 2009. 8p. 28cm. Kolorilus. Danlingva (konciza) versio de *Malkovru Esperanton*. € 1,50

Parizo lumurbo... kaj ties ombraj zonoj. Djémil Kessous. Paris: SAT, [2008]. 24p. 21cm. Ilus. La "Lumurbo" estas ne nur la urbo de la bela mondumo, sed ankaŭ de mizero. € 2,40

Philatelie und Esperanto. Rudolf Burmeister.

Enkonduko de Detlev Blanke. Berlin: Arbeitsgruppe zur Erforschung der Geschichte des Esperanto-Verbandes im Kulturbund der DDR, 2009. 135p. 30cm. Plejparte germanlingva. Kolorilus. Pri la historio de la Esperanta filatelo, kun emfazo pri la Esperanta filatelo en GDR; aldone, prezento de la filatela eksponaĵo "Pri la historio de Esperanto". € 27,30

Plano B. Mobilizo por savi civilizacion. Lester R. Brown. El la angla trad. kolektivo. Paris: SAT, 2009. 341p. 24cm. ISBN 9782918063019. Sintezo dokumento pri la nuna stato de la mondo (el naturmedia, sociala kaj politika perspektivoj). € 20,70

Platero kaj mi. Andaluza elegio. Juan Ramón Jiménez. Desegnaĵoj de Pedro Ullate López. En Esperanton trad. M. Gutiérrez Adúriz. Málaga: Andaluza E-Unuiĝo, 2009. 200p. 18cm. ISBN 9788493030430. Poemoj en prozo, en kiuj la aŭtoro, per dialogoj kun sia azeno Platero, priskribas andaluzan vilaĝon, kun ties ĉi homoj kaj lokoj. € 7,50

Rip Van Winkle. Washington Irving. El la angla trad. I. Oneţ. Thaumiers: LKK, 2009. 20p. 30cm. Suplemento al *La Kancerkliniko*. ISSN 03985822. Ĉarma rakonto el la unua duono de la 19-a jc. € 5,40

Ŝtatoj, landoj kaj lingvoj de la mondo. Andrzej Grzębowski k.a. Bydgoszcz: Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo "Kujavio kaj Pomerelio" / Skonpres, 2009. 16p. 21cm. Kun kolora mapo (42x59cm). ISBN 9788389962324. Prezento de 298 ŝtatoj kaj teritorioj, kaj listo de 163 lingvoj. € 3,30

Vundebila loko. Gerður Kristný. El la islanda trad. B. Ragnarsson. Novjorko: Mondial, 2009. 128p. 22cm. ISBN 9781595691422. Poemaro de premiita islanda aŭtorino plurfaceta. € 12,00

NELIBROJ

Fabeloj de Andersen 15. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2009. 79min. Enhavas *Paŝtistino kaj kamentubisto*, *Dano Holger*, *Knabineto kun alumetoj*, *Bildo el kastelremparo*, *El fenestro de Vartou*, *Najbaraj familioj*. KD. € 12,00

Fabeloj de Andersen 16. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2009. 75min. Enhavas *Malnova strata lanterno*, *Malgranda Tuk*, *La ombro*. KD. € 12,00

Fabeloj de Andersen II. Voĉlegas Stano Marček. En Esperanton trad. L.L. Zamenhof. Martin: Stano Marček, 2009. 8 diskoj. Pli ol ok horoj da popularaj rakontoj. KD. € 79,50

Glumarko "Paco per Esperanto". Paris: SAT. 4,5x7,5cm. La vortoj "Paco per Esperanto" sur ĉielarka fono. € 0,30

En la rubriko *Laste aperis* menciigas nur tiuj varoj kiuj estas aĉeteblaj de la Libroservo de UEA, kaj kiuj ne menciigis antaŭe en tiu ĉi rubriko. Ni petas eldonantojn de esperantajj sendi al la Libroservo specimenojn de siaj eldonaĵoj kaj informojn pri prezoj, rabatoj, sendokostoj.

DUMVIVAJ MEMBROJ:

Germanio: F. Cruzaley.

DONACOJ

Ĝis la fino de 2009:

Konto Afriko: Hispanio: R. Urueña 100,00. Nederlando:

J. Derks 50,00; F. D. van Zoest 25,00. Nov-Zelando: T. Jansen 37,16. Svedio: U. Luin 50,00. *Sumo en 2009: 2 391,21.*

Fondaĵo Ameriko: . Meksiko: M. Schäffer 100,00. *Sumo en 2009: 3 206,35.*

Konto Novjorka Oficejo: Hispanio: L. Hernández 100,00; R. Urueña 150,00. *Sumo en 2009: 768,94.*

Fondaĵo Canuto: Nederlando: R. Moerbeek 50,00. Partoprenantoj de la 94-a UK: 500,00. *Sumo en 2009: 6 232,41.*

Konto Espero: Hispanio:

L. Hernández, R. Urueña – po 100,00. *Sumo en 2009: 420,00.*

Konto Reklamado en EU: Japanio: E. Miyoshi 40 777,19. *Sumo en 2009: 40 777,19.*

Triamonda Kongresa Fondaĵo: Partoprenantoj de la 94-a UK: 949,10. *Sumo en 2009: 1 572,10.*

Fondaĵo Junularo: Nederlando: Anonima 10,00. *Sumo en 2009: 191,78.*

Ĝenerala kaso: Nederlando: F. D. van Zoest 25,00; Anonima 20,00. Usono: R. Jaderstrom 34,70. *Sumo en 2009: 2 345,27.*

Al ĉiuj koran dankon! UEA

Anoncetoj

Unu vorto = 1 €. Ni ne respondecas pri la enhavo. Ripeto ne rajtigas rabaton. Pri korespondpetoj zorgas ankaŭ Koresponda Servo Mondskala, B.P. 6, FR-55000 Longeville-en-Barrois, Francio, www.multimania.com/kosomo.

Endanĝerigitaj Lingvoj Indiĝenaj

Kiam lingvoj kaj kulturoj malaperas, la homa heredaĵo malpliigas. Ni kiuj laboradas por protekti la homan heredaĵon informiĝu kaj informu pri indiĝenaj lingvoj kaj kulturoj. Kiel? Per Projekto Indiĝenaj Popoloj. Kontaktopersono/Komisiito: (s-ro) Erik Felker, ejfelker@dslextrême.com, 414 E Cedar Ave, Apt.11, Burbank CA 91501, Usono.

Vizitantoj al Sud-Afriko junie/julie kontaktu lokajn klubojn por ĉiĉeronado, veturoj, kunvenoj: vblotnitz@intekom.co.za.

Kleriga Tago en Havano

Por la oka fojo estos en la Universala Kongreso Kleriga Tago; ĝi okazos lundon la 19-an de julio. Proponoj por partoprenigaj programeroj, podiaj diskutoj, laborgrupoj, kiuj rilatas ekzemple al movado, lingvoj, informado, organizado, aŭ prelegoj pri nekutimaj temoj, estas bonvenaj ĉe Claude Nourmont, vicprezidanto kaj estrarano pri edukado, kulturo, kongresoj (adreso reta kaj nereta sur la paĝo 26).



Reinhard Haupenthal komencis la kompilon de kompleta bibliografio de monografioj de Zamenhof (originaloj kaj tradukoj). Li volonte ricevos indikojn pri iom raraj aŭ malfacile atingeblaj titoloj, precipe se temas pri tradukoj en naciajn lingvojn – se eble kun indiko de biblioteka trov-loko. Skribu al: Reinhard Haupenthal, La Saousse, FR-84340 Malaucène, Francio. rete: rihaupenthal@aol.de.

BALDAŬ APEROS: Angla-Esperanto-Angla Vortaro de John Wells. Proks. 520 paĝoj. Antaŭmendoj kun rabato nur ĝis 28 februaro 2010: www.librejo.com

Instruado kaj esplorado en Indonezio



Post la lecionoj en la Muzeo pri la Azia-Afrika Konferenco, la grupo fotiĝis en la salono kun la flagoj de la afrikaj kaj aziaj landoj. (Fotis Feriyanto, fotisto de la Muzeo.)

En Batam, indonezia insuleto apud Singapuro, komence de novembro 2009 okazis la kvara Azia Vegetarana Kongreso, kiun mi ĉeestis prepare al la partopreno de TEVA en la Internacia Vegetarana Kongreso en Ĝakarto en 2010.

Tamen, la partopreno en la kongreso ne estis mia nura aktivado en Indonezio. Verŝajne eĉ pli gravaj estis mia esplorado pri la historio de la (iam vigla) Esperanto-movado en tiu lando por nun verkata libro pri la temo (jam aperis artikoloj tiurilataj en *Esperanto en Azio* n-roj 60, 61 kaj 62) kaj instruado aŭ almenaŭ enkonduko de Esperanto al kiel eble plej multe da homoj.

Rilate al la esploroj mi sukcesis renkonti kvar veteranojn: en Yogyakarta interalie Heroa Wibisono kaj Esperantista Gunawan Wibisana, kiuj venis paroli al miaj lernantoj pri sia esperantistiĝo antaŭ 50 jaroj. En Bandung kaj Semarang mi parolis kun pluraj familianoj, konatoj kaj ekslernantoj de jam mortintaj influaj indoneziaj esperantistoj, kaj tiel akiris gravajn informojn kiujn mi ne povintus ekhavi el aliaj fontoj. Estas danke al ESF ke mi povis fari ĉi tiun esploron, kiun mi daŭrigos, interalie ankaŭ dum mia sekva vojaĝo al Indonezio.

Jam dum la kongreso, post mia prelego (rilata al oficiala ĉiusemajna vegetara tago en Gento, Belgio), mi povis paroleti pri Esperanto. En tiu vespero mi donis mian unuan, privatan lecionon en Indonezio: ĉe miaj gastigantoj. Ĉar mia gastigantino interesiĝis pri Esperanto kaj ankaŭ estas direktorino de bazlernejo, ŝi tiel organizis ke, en la tagduono inter la kongreso kaj mia forflugo, mi povis dum po unu horo instrui Esperanton al tri grupoj da lernantoj: unu grupo da bazlerneĵanoj kaj du grupoj da mezlerneĵanoj. Post la tagmanĝo mi flugis al Yogyakarta, kie la postan tagon komenciĝis mia planita instruvojaĝo.

Entute mi instruis Esperanton dum kvardek kvar horoj, en ses diversaj urboj (Batam, Yogyakarta, Semarang, Bandung, Ĝakarto kaj Bogor) kaj tio en diversaj lokoj: du bazlernejoj, du mezlernejoj, du altlernejoj, tri universitatoj kaj unu muzeo kaj aldone tri-

foje hejme ĉe gastigantoj aŭ amikoj, kaj unu fojon por grupo de lernantoj de hejma instruistino, kiu mem estis sekvinta la kurson la antaŭan tagon. Entute partoprenis preskaŭ 500 infanoj, studentoj kaj plenkreskuloj. Mi disdonis pli ol cent ekzemplerojn de la E-ŝlosilo por indonezianoj (*Kunci Esperanto*; vidu la rubrikon Laste aperis ĉi-numere), kiun UEA sukcesis eldoni ĵus antaŭ mia vojaĝo, kaj preskaŭ cent *Poŝamikojn* por ebligi al la lernantoj mem studi. Ne eblis donaci tiujn libretojn al ĉiuj, sed eĉ tiuj kiuj partoprenis nur unu aŭ du horojn, ricevis materialojn por plustudi, kiel ekzemple kopion de la gramatika parto de la ŝlosilo, vortliston de indoneziaj vortoj kiuj similas al sia Esperanta ekvivalento kaj liston de interesaj retligiloj por pluinformiĝi pri Esperanto. En Semarang, Bandung kaj Ĝakarto aperis paperaj kaj retaj gazetartikoloj pri la kursoj kaj/aŭ pri Esperanto ĝenerale, kun mencio de la kursoj. Ligiloj al tiuj artikoloj legeblas en la Ipernity-blogo de edukado.net, kie aperas ankaŭ pli detala raporto pri la vojaĝo. Pliaj esperantlingvaj artikoloj pri ĉi tiu vojaĝo aperos en *Esperanto en Azio* (nr. 67), *Internacia Pedagogia Revuo* (2010/1) kaj en *Esperantista Vegetarano* (2010/1).

Tiun rezulton pri instruado mi ne povintus atingi sen la helpo de KAEM kaj Katalin Kováts de edukado.net. KAEM instigis min instrui (kio fine iĝis mia plej granda okupo dum la vojaĝo), subvenciis la ŝlosilojn kaj *Poŝamikojn*, kaj donis stipendion por kovri miajn surlokajn kostojn. Katalin Kováts kaj ŝia retejo edukado.net multe helpis min prepari la lecionojn mem. La sperto en Indonezio estis tre pozitiva: mi mem ĝuis la instruadon, kaj ĉie oni petis min reveni por instrui. Mi planas fari tion dum mia venonta vizito al Indonezio, okaze de la Internacia Vegetarana Kongreso en Ĝakarto, de la unua ĝis la sesa de oktobro 2010. Dum tiu kongreso TEVA plej verŝajne havos budon kun informoj pri Esperanto, kaj donus bonan impreson se ĉe ĝi deĵorus apud indoneziaj komencantoj ankaŭ eksterlandaj esperantistoj. Antaŭ, dum kaj post la kongreso mi ne nur instruos, sed ankaŭ, se eble, organizos ekzamenojn. Por ĉio ĉi estas bonvenaj pliaj spertaj esperantistoj. Se vi pensas iri tien, aŭ alimaniere povos helpi, bonvolu kontakti TEVA-n (vidu la Jarlibron). **Heidi Goes**



Kadre de la Universitata manifestacio "VI-a Festo de la Historio en Bolonjo", pri la temo "Trans la landlimoj. Lingvaĵoj kaj heredaĵo de la historio" (Bolonjo 17-25.10.09), en kiu partoprenis pli ol 100 kulturaj kaj libervolaj asocioj, la 21-an de oktobro Bolonja E-Grupo "A. Tellini 1912" aranĝis publikan kunvenon pri la temo "100 jaroj de Esperanto en la Bolonja historio".

En salono de la urbcentra hotelo Corona D'Oro kunvenis multaj gesamideanoj kaj civitanoj. D-ro Daniele Agostini (sur la apuda foto), prezidanto de la Grupo Tellini, malfermis la programon, raportante la historion de Esperanto en la urbo Bolonjo. En la jaro 1909 prof. Achille Tellini, kiu jam estis esperantisto de

kelkaj jaroj, transloĝigis el la urbo Udine al Bolonjo. Okaze de Internacia komerca foiro en la nova urbo li aranĝis E-budon, por informi pri taŭga kaj utila uzado de la internacia lingvo en komercado.

Liaj klopodoj estis sukcesaj, li varbis novajn esperantistojn kaj en la jaro 1912 li fondis la Bolonjan Esperantistan Societon.

Sekvis la dua preleganto, d-ro Valerio Dalla, kiu daŭrigis la prezentadon pri la agado de la Bolonja E-grupo. Li menciis la plej gravajn aranĝojn kaj travivaĵojn: 4 naciaj kongresoj (1920, 1952, 1986, 2000), la 40-a Universala kongreso (1955); krome li menciis pri la multnombraj sukcesaj kunvenoj por memorigi la diversajn okazaĵojn dum la jarcenta vivo de la Grupo Tellini.

D-ro Agostini brile klarigis pri la strukturo de la internacia lingvo al la ĉeestantaj ne-esperantistoj, anoncante je la fino la novajn kursojn en nia klubejo.

La kunveno finiĝis per agrabla regalado kun bongustaj dolĉaĵoj kaj trinkaĵoj.

Mario Amadei



La Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK)

- ◆ **bela marborda situo, en mondfama universitato**
- ◆ **trisemajna intensa lernado de Esperanto**
- ◆ **du niveloj: meza kaj supera**
- ◆ **internaciaj instruistaro kaj studentaro**
- ◆ **riĉaj vesperaj kaj semajnfinaĵaj programoj**

Datoj: 28 junio – 16 julio 2010.

Loko: Universitato de Kalifornio, San Diego (UCSD).

Instruistoj: Katalin Kováts (Hungario/Nederlando), Lee Miller (Usono), Grant Goodall (Usono) kaj gastparolantoj: Amri Wandel, Orlando Raola kaj Duncan Charters.

Speciala kotizo por studentoj kaj instruistoj! Stipendioj haveblas.

Trovu pli da informoj en <http://esperanto.org/nask>, aŭ skribu al la kunordiganto: Ellen M. Eddy, 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512, Usono. ☎ (+1) (360) 754-4563; ✉ eddyellen@aol.com.

NASK okazos kvara-foje en sud-Kalifornio. La instruistoj pretigas dunivelan studprogramon kiu emfazos la aktivan uzadon de Esperanto kaj enprofundiĝon en la Esperantan kulturon. Oni povas perfektigi sian Esperanton kaj facile iri al Havano poste por la UK 2010.



Esperanto en plia filmo

Numb. Produktinto, aŭtoro kaj direktoro:
Michael Ferris Gibson. Heretic Pictures, 2006.

Interesa, futurisma filmo usona, kiu montras la homan irason apenaŭ spertantan vivon; nur ekzistanta ĝi estas, kaj tio danke al la domino de narkotilo nomita "la guto". Aro da "anĝeloj", maŝinoj ŝajne kreitaj per komputila klonsistemo, tamen sukcesas konservi ombron de civilizacio. Ne estas ĉiam facile sekvi la intrigon, ĉar oni iom tro, kaj iom subite, retroen saltas, kvankam helpas la spektanton la fakto ke ĉi tiuj retrovidoj estas arte filmitaj en speco de patina koloro dum la cetero de la filmo estas nigrablanka. Aparte interesaj por esperantistoj estas du mallongaj scenoj kun Esperantaj dialogoj, fortranĉitaj el la DVD-versia filmo mem, sed spekteblaj kiel kromaĵoj ĉe la fino! (AT)

Rento je fiksdaj deponoj 2,0%

Pro la evoluo en la monmerkato UEA malaltigos la renton je la ŝpardeponoj de la membroj el 2,5% al 2,0% ekde la 1-a de marto 2010.

Osmo Buller
Ĝenerala Direktoro

95-a UK: Francio unualoke

Ĝis la 18-a de januaro 511 kongresanoj el 51 landoj estis registritaj kiel aliĝintoj al la 95-a UK en Havano (17-24 julio 2010).

Ĉar tiu nombro ankoraŭ ne inkluzivas la kubanojn, kiuj aliĝis pere de LKK, la unuan lokon fiere plu tenas Francio kun 65 aliĝintoj. Germanio kaj Japanio (po 50) dividas la duan lokon. La aliaj landoj kun pli ol 10 aliĝintoj estas Brazilo (39), Italio (24), Nederlando (22), Pollando (18), Britio (16), Danio (15), Kubo (14), Belgio, Kroatio kaj Meksiko (po 12), Bulgario kaj Kanado (po 11).



Ĉu vi jam rekotizis por 2010?

Frua pago certigas la kontinuecon en la ricevado de tiu ĉi revuo. Krome, ĝi helpas la laboron de la Centra Oficejo kaj ŝparas monon al UEA. Antaŭdankon!



GRANDIOZA PANORAMO



Okaze de la 70-a datreveno de unu el la plej elstaraj esperantistoj de la lastaj jardekoj, Humphrey Tonkin, UEA eldonis tiun ĉi panoraman kolekton de artikoloj de 106 aŭtoroj pri lingvopolitikaj, interlingvistikaj,

esperantologiaj, historiaj, movadaj, literaturaj kaj strategiaj temoj, kaj rememoroj. Pinta eldona omaĝo al la pinta aganto.

LA ARTO LABORI KUNE. Festlibro por Humphrey Tonkin.
Red. Detlev Blanke kaj Ulrich Lins. Rotterdam: UEA 2010.
901 p. 25cm. ISBN 978 92 9017 113 3. Prezo: €60,00.
Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

**VIZITU VIAN PROPAN DOMON ĈE
NIEUWE BINNENWEG 176 EN ROTTERDAMO DUM**

MALFERMA TAGO

sabaton la 17-an de aprilo 2010 (10h00 - 17h00)



- ★ En la libroservo ĉio rabatita je 10%
- ★ Specialaj ofertoj

**Speciala gasto:
MARK FETTES**



- ★ Bazaro de e-aĵoj
- ★ Senpaga loterio
- ★ Kafo kaj teo senpage servataj


NIAJ PASINTJARAJ ELDONAĴOJ



Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj. Aktoj de la kolokvo en Vieno, 19-20 oktobro 2007. Herbert Mayer, Detlev Blanke, Utho Maier, Karl-Heinz Schaeffer, Christian Cimpa, Árpád Máthé, Reinhard Haupenthal, Miroslav Malovec, Marek Blahuš, Barbara Pietrzak. Red. Detlev Blanke. La tekstoj de naŭ laŭtemaj prelegoj. Rotterdam: UEA, 2009. 81p. 30cm. ISBN 9789290171096. Prezo: €9,90.



Internacia Kongresa Universitato 2009. Bjalistoko, Pollando, 25 julio – 1 aŭgusto 2009. Amri Wandel, Nikolau Dols Salas, Tsvi Sadan, Tomasz Chmielik, Mark Fettes, Árpád Máthé, Otto Prytz, Mauro La Torre, Barbara Despiney. Red. José Antonio Vergara. La tekstoj de naŭ diverstemaj prelegoj. Rotterdam: UEA, 2009. 140p. 30cm. Prezo: €15,00.



Elektitaj paroladoj kaj prelegoj. Ivo Lapenna. 22 paroladoj kaj prelegoj pri Esperanto, Movado kaj kelkaj aspektoj de niaj lingvoj kaj kulturo. Rotterdam: UEA, 2009 (2a eld.). 166p. 21cm. ISBN 9789290171102. Prezo: €9,90.



Multlingva frazlibro. Yohanes Manhitu. Centoj da esprimoj grupigitaj laŭ temoj, en la lingvoj Esperanto, indonezia, davana, tetuma, kupanga, angla, franca, hispana, portugala. Rotterdam: Oceania Komisiono de UEA, 2009. 143p. 21cm. Prezo: €7,50.



Kunci Esperanto. Kompilis Heidi Goes kaj Bobby Mulyadi. Nova, moderna ŝlosilo indonezia kun Esperanto-indonezia vortlisto. Rotterdam: UEA, 2009. 48p. 15cm. ISBN 9789290171119. Prezo: €1,20.

Poŝtmarkoj L.L. Zamenhof. Poŝtmarkoj Ivo Lapenna.



Bloko de dek 44-eŭrocendaj poŝtmarkoj eldonita en Nederlando okaze de la 150-a datreveno de L.L. Zamenhof. Prezo: €5,50.



Bloko de dek 44-eŭrocendaj poŝtmarkoj eldonita en Nederlando okaze de la 100-a datreveno de Ivo Lapenna. Prezo: €5,50.

Nur por libroj: triona rabato por aĉeto de minimume tri ekzempleroj de la sama titolo.



CRI online
国际在线 世界语网 esperanto.cri.cn

Ĉiun tagon ĈRI parolas
Esperantalingve pri ĉio
En la mondo kaj en Ĉinio
Kaj kiel amikponto rolas.

Esperanto

Vizitu Forumon

Nomo

Pasvorto

Esperanto ĈRI

Ĉetpaĝo | Novajoj kaj Komentoj | Fenestro de Ĉinio | Interreta Radio | Elektroniklibro | E-Klubo | Ĉina Enciklopedio



Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040
Tel: +8610 68891940
Fakso: +8610 68891164
E-mail: espradio@cri.com.cn

Ni konigas Ĉinion al la mondo kaj la mondon al
Ĉinio, kaj raportas pri la mondo al la mondo.

La E-retpaĝaro de ĈRI estas la plej ampleksa retservo en
Esperantujo. Post la renovigo ĝi havas pli da funkcioj: la
interreta radio faciligas la aŭskultadon kaj bonvenigas
kontribuon de samideanoj, kaj la E-klubo atendas vian aliĝon.

- Tutmonda
- Akurata
- Enhavriĉa
- Profesia



点击这里, 走进 **中国**
点击这里, 走向 **世界**



Klaku ĉi tie por eniri Ĉinion
Klaku ĉi tie por koni la tutan mondon



**Ĉina
Radio
Internacia**

fondita en 1941
disponanta 32 raportistajn staciojn ekster Ĉinio
funkciiganta la retejon CRI ON LINE en 59 lingvoj,
eldonanta pli ol 30 jurnalojn kaj gazetojn
celanta konigi Ĉinion al la mondo kaj la mondon al Ĉinio kaj profundigi
komprenon kaj amikecon inter la ĉina popolo kaj la tutmonda,
kaj fariĝanta moderna kaj sinteza komunikilo, kun radio, surlinieco kaj
novtipa komunikado en unu tuto.
Al vi intimas, pli kaj pli, la mediato tute nova!